

Kunlaborada

Verketaro



= Esperanta =

= Psikistaro =



DUA ELDONO

- ANVERS -

Eldonata per la zorgoj de la
Federacio Spiritista Belga

1911.

Korespondado en ESPERANTO.

La represigo de la artikoloj estas permesata sciigante la devenon kaj la nomon de la aŭtoro.

La correspondance se fait en FRANÇAIS.

La reproduction des articles est autorisée pourvu qu'on en indique la source et le nom de l'auteur.

La traduction française des articles sera envoyée à qui en fera la demande pour la publication.

Correspondence is done in ENGLISH.

The reproduction of the articles is allowed inasmuch as the origin and the author's name are mentioned.

The English translation of the articles will be sent on application, for publishing only.

Die Briefwechselung ist in DEUTSCH gestattet.

Die Aufnahme der Artikel ist veranlasst insoweit der Ursprung und des Verfasser's Namen verzeichnet wird.

Die Deutsche Uebersetzung der Artikel wird, auf Anfrage für Wiederausgabe, gesandt.

La correspondencia se admite en CASTELLANO.

La reproducción de los artículos está autorizada ; siempre haga constar el nombre del escritor y el origen.

La traducción castellana de los artículos será enviada à quien la pide para la publicación.

De korrespondentie wordt in het NEDERLANDSCH gedaan.

De opname der artikels is veroorloofd in zoo ver als men er de bron en schrijver's naam van aanduidt.

De Nederlandsche vertaling der artikels zal, op aanvraag voor verdere verspreiding, gestuurd worden.

Sekretario, A. STAS,

Rue St. Antoine, 19.

Anvers.

Belgujo.

KUNLABORADA VERKETARO


ESPERANTA PSIKISTARO

(PSIKISMO KAJ ESPERANTO)

INTERNACIA UNUIĜO POR
PSIKISMA STUDADO PER ESPERANTO.

Sub la honora prezido de S^{ro} Emile Boirac, Rektoro de la
Universitato de Dijon, Francujo.

Dua Eldono



ANVERS

Eldono publikigita per la zorgoj de la
"BELGA SPIRITISTA FEDERACIO"

— 1911 —

PRESEJO DE JULES DE WINTER
PETIT MARCHÉ, 13. — ANVERS

ESPERANTA PSIKISTARO

(PSIKISMO kaj ESPERANTO)

POR OBTENI EKZEMPLERON DE TIU ĈI
BROŝURO ADRESU VIN AL LA >>>>>
BUREAU PERMANENT D'ÉTUDE DES
PHÉNOMÈNES SPIRITES, 8, RUE DES
BABILLARDES, ANVERS, BELGIJO.




BIRLO SPIRITISTA EDRBRAGIO

— 1011 —

PARIS DE JULES DE WINTER
PARIS MAR. 10. — ANVERS

ENHAVO

Korespondado	2
Esperanta Psikistaro, Programo	6
Kion diras pri nia movado grandaj pensuloj : Zamenhof,	
E. Boirac, C. Flammarion, W. T. Stead	9-11-15
Letero de Doktoro L. L. Zamenhof	9
Pri Esperantismo kaj Psikismo, E. Boirac	9
La Psikaj Faktoj, Camille Flammarion	11
Letero de S ^{ro} W. T. Stead	15
De Psikismo al Homaro Integrala, J. C. Chaigneau	16
Esperanto-Spiritismo, Quintin López	26
La rolo de Esperanto rilate al Spiritismo, Chevalier Le	
Clément de St.-Marcq	31
Kio estas Spiritismo, Gabriel Delanne	37
Esperanto kaj Spiritualismo, Le Cornec	46
Gitarkunsido, P. M. Petersen	48
Spiritistaj Memoroj, D ^{ro} L. Th. Chazarain	52
Estas necese ilin kutimigi, D. Juan Figueredo	56
Pri la homa Destino kaj Dio, Komandanto Darget	58
Kelkaj vortoj pri Teologio, Chevalier Le Clément de	
St.-Marcq	59
Kelkaj notoj pri Magnetismo, Pierrard	63
Telepatia magnetkuracado, Em. Vauchez, E. Dupin	67
Libera Volo kaj Antaŭdestino, R. Feilgenhauer	68
Kelkaj personaj okazintaĵoj, Chr. Lyngs	72
Universalista Unio por Filozofa Serĉado, Heidet de	
Heydeck	76
Klariga Rimarko	79
Internacia Oficejo de Spiritismo	80



Esperanta Psikistaro

INTERNACIA UNUIĜO

POR PSIKISMA STUDADO PER ESPERANTO

(Hipnotismo, Magnetismo, Telepatio, Spiritismo, k.t.p.)

Sub la titolo « ESPERANTA PSIKISTARO » fondiĝas internacia Unuiĝo per Esperanto, por internacie studadi la psikismajn aferojn (f-nomenojn, dokumentojn kaj laŭvole teoriojn.)

ESPERANTA PSIKISTARO sin turnas al ĉiuj esperantistoj kiuj estas samtempe psikistoj (ĉu hipnotistoj, ĉu magnestistoj, ĉu telepatiistoj, ĉu spiritistoj, k.-t.-p.)

Ĝi sin turnas ankaŭ al ĉiuj psikistoj kiuj bonvolos iĝi esperantistoj.

Oni povas antaŭvidi estontan tempon kiam ĉiu el la diversaj psikistaj kategorioj povos starigi propran sendependan federacion per Esperanto; sed por la nuna tempo taŭge estas ke ĉiuj psikistaj fortoj sin kunarigu en unu fasko, por fundamente enradikigi la internacian helpon de Esperanto al ĉiuj psikismaj studadoj.

Sendu vian aliĝon al

J. C. CHAIGNEAU,

Rue de Douai, 6,

PARIS, Francujo.

aŭ al la Sekretario

A. STAS,

Rue St. Antoine, 19,

ANVERS, Belgujo.

KOMUNA PROGRAMO

I. TUJA PARTO.

1° Fari alvokon al la duoble samideanoj (esperantistoj-psikistoj) per anoncoj en Esperantaj Gazetoj.

2° Fari alvokon al la tutmondaj Psikistoj per nacilingvaj cirkuleroj kaj, kiam eble estos, per artikoloj en diversnaciaj psikismaj gazetoj.

3° Sekve organizi kursojn de ESPERANTO ĉe la psikismaj Societoj, por esperantistigi kiel eble plej multe da Psikistoj.

4° La organizantoj de tiuj kursoj estas petataj sin konigi kaj pri siaj laboroj kaj rezultatoj komuniki al la Sekretario.

5° Ĉiuj aliĝintoj estas petataj komuniki al la Sekretario la nomojn de la personoj plej fervoraj kaj spertaj je la celo kolekti aron de spertaj sindonemuloj por faciligi la estontan elekton de regula komitato.

6° Tiu elekto fariĝos dum speciala kongreso okaze de Esperantistara kongreso en la kongresurbo.

(La efektivigo de tia speciala kongreso komencas la nunan jaron en Anvers.)

7° Dum la sama speciala kongreso oni decidos pri pli detala administra organizado de la Psikistaro (pri la starigo de la diversaj centroj kaj ilia interligo).

8° Tion atendante, la aliĝintoj estas petataj komuniki al la sekretario ĉiujn ideojn kapablajn plibonigi la programon. Raportoj pri tiuj ideoj estos prezentataj dum la speciala kongreso.

9° Ĝis la decidoj de la speciala Kongreso kaj ĝis la elekto de regula komitato, la kotizaĵo de ĉiu aliĝanto estas laŭvola sed almenaŭ po I Franko (40 Sd.). Ĝi devas esti sendata al So A. STAS, la sekretario de la Iniciativa Komitato, 19, Rue St. Antoine, Anvers, Belgujo.

II. CELA PARTO.

La Iniciativa Komitato fidas la plenan aprobon de la double samideanoj pri la jenaj projektaj punktoj kiuj precizigos la celon kaj la estontajn laborojn de la PSIKISTARO.

1° Kolekto de ĉiuj gravaj sciigoj pri la psikismaj okazintaĵoj.

2° Kolekto de diversaj dokumentoj montrataj en la speciala kongreso.

3° Preparadoj pri « Psikisma Vortaro » ĉu per komunik-aĵoj al la Sekretario, ĉu per artikoloj en la presorgano pri kiu tuj estos temo (art. 6^a).

4° Decidoj pri la psikisma vortaro dum la speciala kongreso.

5° Ĉiujare okazos speciala kongreso okaze de la Esperantistara kongreso en la kongresurbo.

6° Fondo de gazeto aŭ revuo (titolita ekz. « *Espero Psikista* » aŭ « *Internacia Psikisma Revuo* »).


7° Eldono (kiam eble estos) de psikismaj verkoj originalaj esperante skribitaj.

8° Traduko en Esperanton kaj eldono (se eble) de la psikismaj verkoj plej ŝatataj en la diversaj landoj.

GRAVA SCIIGO

Ekster tiu programo la aliĝantoj de nia Internacia Unuiĝo estas petataj sendi bonvoleme sian fotografajon al la sekretario, je la celo formi tre interesan kolekton de ĉiuj portretoj de la PSIKISTARO.

Tiu kolekto estos montrata en la speciala Kongreso.



D^{no} L. ZAMENHOF

12-11-1908.

VARSOVIO

Str. Dzika, n^o 9.

Al Esperanta Psikistaro,


Karaj Sinjoroj,

Kun plezuro mi ricevis vian sciigon pri la fondo de la « Esperanta Psikistaro ».

Ke mi plene aprobas la fondon de via Unuiĝo, pri tio vi, kompreneble, ne povas dubi. Al la Esperanta Psikistaro mi sendas mian plej sinceran saluton kaj bondeziron.

Via

L. L. ZAMENHOF.



Pri Esperantismo kaj Psikismo

La ideo utiligi Esperanton por la disvastigo de Psikismo ŝajnas al mi tre interesa kaj tre praktika.

Kvankam preskaŭ ĉiu homo sentas instinktan intereson por la psikaj demandoj, tamen la personoj kapablaj ilin efektive esplori estas en ĉiu lando malmultaj. Pro diversaj kaŭzoj ankaŭ ili estas plej ofte devigataj ne montri publike sian agadon, kaj konservi sekrete la rezultojn de siaj esploroj. Tiamaniere la psikistoj en la tuta mondo preskaŭ ne sin konas reciproke kaj ne povas facile interŝanĝi siajn ideojn nek interkomuniki siajn eltrovojn. Per Esperanto la tutmonda psikistaro fariĝos « unu granda rondo familia », kaj konsciante sian tutmondecon, ĝi laboros pli kuraĝe kaj pli obstine por renversi la aŭtaŭjuĝojn, kiuj baras la vojon al la progresado de Psikismo kaj por vekti la dormantan en ĉiu homo intereson por la psikaj demandoj.

Aliparte Esperantismo kaj Psikismo respondas al la samaj bezonoj de la homa spirito kaj postulas ĉe siaj adeptoj la samajn inklinojn kaj kapablojn. Psikisto deziras transpaŝi la limojn de la videbla mondo kaj penetri en pli profundan regionon, kie kaŝiĝas la veraj kaŭzoj kaj principoj de ĉiu realeco. Simile Esperantisto deziras transpaŝi la limojn de sia nacieco kaj penetri en la spiriton de la tuta homaro. Ambaŭ antaŭvidas kaj esperas venontan tempon, kiam la homoj, akirintaj novajn organojn, ebligos senpere komuniki unu kun la alia tra la tuta spaco ne nur materie sed ankaŭ spirite; kaj eĉ oni povas diri, ke la Esperantisto jam akiris kaj uzas unu el tiaj organoj dank'al la genia kreaĵo de D^{ro} Zamenhof, kiu vere estas kvazaŭ nova telepatia sentorgano, t. e. sentorgano de la internacia vivo. Ambaŭ maltimas la dubojn kaj mokojn de la kontraŭuloj de ĉiu progreso kaj iras obstine aŭtaŭen, al radiantia idealo de vereco kaj justeco, neniel atentante ke oni nomas ilin frenezuloj kaj utopiistoj.

Al scienco de la venontaj tempoj t. e. al Psikismo plene konvenas do la lingvo de la estonta homaro: t. e. Esperanto.

E. BOIRAC.



LA PSIKAJ FAKTOJ

La fameŝatata astronomo kaj psikisto S^{ro} Camille Flammarion, petita de ni, respondis per tre afabla letero, dirante:

- Mi estas tiom superŝutita de miaj laboroj pri la kometoj,
- ke estus al mi tute neeble skribi la paĝon kiun vi deziras.
- Sed kial vi ne elektus mem, tute simple, paĝon de *L'Inconnu* (La Nekonato) aŭ de *Les Forces naturelles* (La naturaj Fortoj), aŭ de *Uranie*, por ĝin publikigi en esperanto?

Pro tiel simpatia bonvolemece, ni petis la permeson elekti tekston kiu, estante sendependa de longa paĝaro, formas pli ĝuste tutaĵon. Tial ni tradukis la antaŭparolon skribitan de S^{ro} C. Flammarion, en 1897, por la unua eldono de *La Survie* (La Postvivo), de la tre estimata (kaj nun tre bedaŭrata) S^{ino} Rufina Noeggerath.

Homo devas esti nek kredema nek malkredema.

La kredemo, sen juĝema spirito, igas nin trompataj de iluzioj kaj mensogoj.

La antaŭdecidita malkredemo enfermas la animon en juglandŝelo kaj ĝin blindigas.

Same en ambaŭ okazoj, estas kvazaŭa anemio de la penso, kaj oni demandas sin kiamaniere la homa estaĵo, kies esenco estas pensi, falas en la unuan aŭ la duan el tiuj ekstremaĵoj. Tia estas tamen la ĝenerala okazo.

Nenia problemo, ne esceptante tiujn de la astronomio, estas, certe, pli grava ol tiu de nia spirita naturo. Ĝi estas ĉiam la fama demando de Hamlet: *To be or not to be*, ĉu esti aŭ ne esti! Depost la apero de homo sur la tero, la religioj kaj la filozofioj pretendis solvi la problemon, sed la ŝlinkso ironie ridetema restis muta, kaj la homaro ŝajnas

esti, en ĉiuj tempoj, dividiĝinta laŭ du partioj : la kredantaro kaj la nekredantaro.

De duono da jarcento tamen, la homa scienco, plilarĝiĝante, montras al ni ke la eksteraj ŝajnoj povas trompi kaj ke la videbla mondo estas nur la kovrilo de mondo nevidebla. La bela eltrovaĵo de S^{ro} Roentgen igas nuntempe *vidi la nevideblon*. La progreso filozofia de tiu evolucio de la scienco ŝajnas al mi eĉ superi la progreson nur sciencon. Ni estis inklinaj konfidi nur al niaj okuloj, al niaj oreloj, al niaj kvin malmultepovaj sentoj, kaj jen la nevideblo aperas al ni. La progresoj de la fiziko permesis konstati la ekziston de la radioj subruĝaj kaj superviolaj, kaj ilin mezuri, tiel malkaŝante sunan spektron dudekfoje pli vastan ol la spektro videbla por nia retino. La fotografo ekkaptas nun, ĉe la fundo de la spacoj, stelojn kaj malproksimajn universojn absolute nevideblajn per la plej potencaj teleskopoj. La telefono transportas elektre sonajn ondojn per forto kaj rapideco kiuj havas nenion komunan kun la akustiko. La fonografo fiksas la forflugantajn sonojn de la parolo. Tiuj eltrovaĵoj, tiuj metodoj novaj, tute aliformigas la vulgaraĵajn ideojn pri la naturo, kaj invitas nin al profunda analizado de la aĵoj.

Antaŭ nelonge, la vorto antaŭsento ŝajnis ankoraŭ sinonimo de iluzio aŭ de hazarda koincido ; la observado de la faktoj montras al ni nuntempe ke la estontaĵo povas kelkfoje esti vidata precize, ĉu en sonĝo, ĉu en somnambulismo propramova aŭ okazigita, ĉu en maldorma stato. La estonto, oni pensas, ne ekzistas. Ĉu tio estas tre certa ? La estonto estas ĝerme en la estanto, ĝi estas la konsekvenco de kio ĝin antaŭiras ; estas nenia efiko sen kaŭzo ; kiu konus la kaŭzojn konus la efikojn. Kio okazas ne povas ne okazi, ĉar ĝi estas determinita de kaŭzoj ekzistantaj. La homa volo, kiu ŝajnas al ni provizita je kelka libera elekto, estas unu el tiuj kaŭzoj ; ĝi ankaŭ ne povas ne decidi sin pro la pli potenca motivo. Nuntempe, oni ne kredeme agas, akceptante la realecon de la antaŭsentoj kaj de iaj antaŭsciigoj.

Antaŭ nelonge, ŝajnis ankoraŭ ke la aferoj devas ĉiuj esti

elĵetataj sur la konton de la halucinoj. Nuntempe, konvenas esti iom malpli necedema. Kelkaj personoj konis la morton de parenco, de amiko, nur per komunikaĵo, je speco psika, kiu uzis, por esti transigita, nek la poŝtan servaron nek la telegrafan fadenon. La telepatiaj fenomenoj ĝuste observitaj estas sufiĉe multenombraj por ke oni plu ne povu ilin nei. Malproksima estaĵo povas troviĝi apud ni je la momento de sia morto kaj aperi al ni, kaj la apero povas esti vidata de multaj ĉeestantoj.

Antaŭ kvardeko da jaroj, la turniĝantaj tabloj verŝigis ondegojn da inko. Iaj scienculoj, cetere ŝatindaj, imagis ilin klarigi per nekonsciaj muskolaj movoj. Aliaj ĉiujn ilin juĝis artifiko de la ĉeestantoj. La atenta observado progresis. Movo povas esti okazigita per tre malforta kontakto, kaj eĉ tute sen kontakto, de nevidebla forto, deveninta el homa estaĵo kaj kiu ŝajnas iom rilati al la elektro. Oni plu ne povas elĵeti la faktojn sur la konton de la erarego aŭ de la stultegeco.

Ne enirante la priskribon de la multegaj fenomenoj apartenantaj al la mondo de la nevideblaj psikaj fortoj, ni kontentiĝu aldoni ke la elmontraj de la animo nur komencas esti studataj per la eksperimenta metodo ; kaj ankaŭ ni devas konstati ke, en tiu fako de faktoj ni povas preskaŭ neniam *eksperimenti*, sed nur *observi*, kio treege malgrandigas la kampon de la studoj. Kaj la kondiĉoj de la tera organeca vivo estas tiel maldelikataj, ke ni estas proksimume en la situacio de homo kiu havas por fari astronomiajn observadojn en lando kies ĉielo estus preskaŭ senĉese nebula.

Tiuj kondiĉoj de escepto estas tiom pli bedaŭrindaj ke la problemo de la animo, kiu estas la sama kiel tiu de la postvivo, estas, nekontraŭdireble, la plej interesa kaj la plej grava el la demandoj, ĉar la afero estas pri ni mem, pri nia intima naturo, pri nia senmorteco aŭ nia neniigo. Oni do devas aplaŭdi la penadojn de ĉiuj laborantoj kiuj, same kiel la estiminda aŭtorino de « La Postvivo », S^{mo} Rufina Noeggerath, celas alporti novajn dokumentojn por lumigi la misteron sub kiu nia transa destino restas envolvita...

Neniu povas malkonsenti ke la religioj ne estas, ĝis nun, plenumintaj niajn esperojn. Ĉu la psikaj studoj tion sukcesos? Mi diris iam, en parolado je la enterigo de Allan Kardec, ke spiritismo ne estas religio, sed scienco. La estonto faros eble ke scienco kaj religio unuiĝos en unu solan sintezon. Ni studu, observu, serĉu.

CAMILLE FLAMMARION.

El la lingvo franca
tradukis J. C. C.



Letero de S^o W. T. Stead.

London ; W. C.

La 14^{an} de Marto 1910.

Al S^o J. C. Chaigneau, Paris.

Kara Sinjoro,

Mi tre dankas vin pro via letero kaj pro via cirkulero.

Kun granda plezuro mi ekscias ke la psikistaj studantoj sentas la gravecon uzadi Esperanton kiel ŝlosilan lingvon de la estonto.

Unu el la plej interesaj faktoj, rilataj al la fenomeno de la spiritreveno, estas la facileco per kiu spiritoj ŝajnas komuniki pense unuj kun la aliaj, sen uzo de iu lingvo. Ili estas ankaŭ kapablaj enpresi siajn pensojn sur la cerbon de mediumo, kies lingvon ili neniel konas, kaj kiu tamen esprimas akurate ilian signifon per siaj propraj vortoj. Laŭ juĝo per nia eksperimentado ĉe la « Julia's Bureau », estas pli facile por ĥino komuniki en angla lingvo per mediumo angla ol enpresi vortojn ĥinajn sur la cerbon de mediumo.

Ĉar, tamen, tiu kapablo ne ŝajnas aparteni al iu inter ni, dum ni estas ankoraŭ en niaj korpoj, Esperanto daŭrigas esti necesajo por internacia komunikado inter enkarniĝuloj. Ĉe la alia flanko de la tombo, feliĉe, vortaretoj kaj vortaroj ne ŝajnas necesaj.

Mi estas,

Via sincero,

W. T. Stead.

Tradukis J. C. C.



De Psikismo al Homaro Integrala

KELKAJ ĜENERALAJ VORTOJ KAJ

SPECIALA TEZO.

La libreto en kiu partoprenas la jena artikolo estis prilaborata per la zorgoj de la iniciatintoj de *Esperanta Psikistaro*. Ĝi do estas tute nedogma; ĉar ĉiu fako de psikistoj povus ĉi tie troviĝi sur la sama egaleca kampo. Tamen, malgraŭ la larĝeco de la alvoko, okazis ke precipe spiritistoj respondis kaj bonvolis kunlabori. Oni do ne miru ke la plej multe el la artikoloj estas verkitaj de spiritistoj. Tio ne estas afero de intenco, sed nur de fakto.

Oni devas efektive konsideri ke la unua celinda utilo de ĉiuj serĉantoj kiuj interesiĝas pri la psikaj fenomenoj, estas unuigi siajn fortojn por pozitive starigi la realecon de tiaj faktoj. Pri la certigo de multaj el ili ni plene interkonsentiĝas; poste, laŭvole, ĉiu fako prezentas siajn klarigojn, siajn teoriojn.

Pro la komuna celo, dezirinde estas ke la psikistoj penu uzadi ĉiujn rimedojn kapablajn faciligi ilian unuigon; por ĝin trafi, unu el la plej necesaj helpiloj estas lingvo internacia; kaj, nediskuteble, inter la proponitaj lingvoj internaciaj, la plej ĝenia, la nura vere parolata kaj jam prospere uzata por specialaj efektivigoj estas Esperanto.

Do, ni ankaŭ uzadu Esperanton, por arigi la observadojn, la eksperimentajn rezultatojn, la studojn, de ĉiuj diversnaciaj serĉantoj, kiuj laboras sur la kampo de la psikaj fenomenoj en la tuta tera mondo.

Tia estas, per du vortoj, la ĝenerala motivo kiu devas instigi ĉiujn psikistojn al uzado kaj propagando de Esperanto. Tial stariginda estas « Esperanta Psikistaro ».

Sed, krom tiu komuna vidpunkto, estu permesate al mi eldiri specialan vidmanieron, kiu, kvankam konsekvenco de la spiritisma kono, tamen estas aparta de la ĝustedirita spiritismo.

Hipnotismo, Magnetismo, Telepatio, Spiritismo, estas fakoj de Psikismo. Tiuj fakoj povas esti sendependaj unu de la aliaj, se la serĉantoj volas studi nur unu el ili. Tamen, laŭ mia opinio, se oni ne nur serĉas, sed serĉadas, ligilo aperos inter la fakoj. Hipnotismo kondukas al Magnestismo (vidu, ekzemple: E. Boirac, *La Nekonata Psikologio*, ĉap. VII), Magnetismo kaj Telepatio kondukas al disdubiĝo de la korpa formo (Myers kaj Gurney, Durand de Gros, de Rochas, Durville, k. t. p.); disdubiĝo de la homa estaĵo kondukas al postmorta vivo kaj Spiritismo. (1) Poste, Spiritismo kondukas al la kono de Homaro Integrala, kiu cetere ne estas la lasta ĉenero, kaj kiun mi tuj provos mallonge klarigi, tiom pli ke ĝi nepre postulas internacian lingvon.

Certe estas ke la ĝenerala celado de nia tempo estas la efektivigo vera de la Homaro, t. e. ĝia solidarigo kaj harmoniigo. Grandaj movadoj de libereco iom post iom rompas la barojn kiuj disigas la diversajn homajn grupojn. Ŝajnas ke, tra krizaj konvulsioj, io puŝas la homojn, por ke en baldaŭa estonto ili ĉiuj povu libere unuigi en unu saman solidarecon, vere propramovan kaj vivantan.

(1) Profesoro Elliott Coues diris en *legado* farita en Chicago dum 1889: « Mi studis ĉiujn fenomenojn diritajn spiritismaj; pri ili kion oni devas konkludi? Nenion, se oni ne komencas per tiu fakto *fundamenta* ke ekzistas korpo materia kaj korpo astrala (aŭ psika), kaj ke la du korpoj disigiĝas kelkafoje unu de la alia, eĉ dum la vivo ». — Alfred Erny, *La Psikismo Eksperimenta*.

Sed, tiamaniere, ĉu oni estos efektiviginta la Homaron integralan, t. e. la Homaron tutan, plenan, posedantan ĉiujn siajn elementojn kunigitajn en kolektivajn konscion? — Supozante ke, en tiaj kondiĉoj, la kuniĝemoj produktus maksimuman rezultaton, oni devas tamen konsideri ke la Homaro tiel restarigita enhavus ankoraŭ grandan parton da abstrakteco; ĉar la mallongeco de la vivado de ĉiu ne estus laŭproportio kun la universaleco de la estaĵo tuta, Homaro; la individua penado estus ankoraŭ oferita al la konkeroj de la tuto, — kiu figurus serion de pasantaj vivantaroj, evolucio de la speco, sed ne evolucio de la individuoj mem. La regenera movado estus do fine nur pliboniginta la Homaron abstraktan (ĉiam konsistantan el elementoj nedaŭraj kaj iluziaj); ĝi ne estus sukcesinta anstataŭigi al ĝi realan Homaron konkretan, Homaron vere integralan.

Estas tie ke interagas, feliĉe, alia faktoro: la faktoro senmorteca, — kiu, dank'al la observadoj kaj eksperimentadoj magnetismaj, telepatiaj kaj spiritismaj, starigas, de tago al tago, pli fortike, kiel kronado de la konstruaĵo de la pozitivaj konoj. Post la simplaj laborintoj de la unua horo, eminentaj scienculoj ne timis certigi, ne nur la magnetismajn faktojn kaj la psikan forton, sed ankaŭ la manifestadon de la mortintoj, ilian inteligentan komunikadon kun la teranoj. Kaj, tiamaniere, la elemento homa, la homa individuo jam aperas laŭ tute alia proporcio. Ĝi ne estas plu la mizera personaĵo limigita de lulilo kaj tombo; ĝi estas esence vivanta estaĵo, senlima en la estinto kaj en la estonto, kun kampo evolucia kiu ebligas al ĝi sin malvolvi mem tra senfina aktiveco kie floriĝadas ĝia persona integraleco. Kaj, de tiam, eble estas ekvidi ke, estante mem integrala, ĝi povos partopreni, kiel kunefikanto konscia, en tutaĵo vere integrala, — kaj konscia per ĝia harmonio.

Jen ankaŭ, per aliaj vortoj, kiel la demando sin prezentas: El kio konsistas Homaro?

Ĝi konsistas unue — kaj nediskuteble — el ĉiuj homaj estaĵoj kiuj nuntempe vivas la teran vivadon.

Ĝi konsistas plie — laŭ la konvinko de la senmortecistoj — el ĉiuj homaj estaĵoj kiuj vivis antaŭe sur nia planedo.

Kiamaniere kunigi en unu saman solidarecon ĉiujn homajn estaĵojn kiuj vivas nun la teran vivadon? — Tio estas unua kampo de serĉadoj kaj agadoj. Tio estas la objekto de la afero propre dirita homara.

Poste, kiamaniere religi al la homaj estaĵoj, nun vivantaj sur la tero, la tie vivintajn antaŭe? La demando estas unue ĉu ili ekzistas ankoraŭ. Por tion scii, bezone estas esplori la nevideblajn tavolojn kiuj nin ĉirkaŭas. Kaj, se tie ni retrovas ilin ĉiam vivantaj, ĉiam vibrantaj je kuniĝemo por ni, estas nature ke ni penadu interrilatiĝi kun ili, per kreskanta komunikado, disrompante la landlimojn de la morto. Kaj tio estas la objekto de la homara Spiritismo.

Se ni alproksimigas unu al la alia la du aferojn (la propre diritan homaran kaj la homare spiritistan), se ni rigardas la penadon de libera solidareco kiun ambaŭ atestas, ĉiu laŭ sia maniero, — ni estas kondukataj konsideri ke ili estas la du elementoj konverĝantaj de unu sama sintezo pli granda, kiu ĉirkaŭbrakas ilin ambaŭ en sia tutaĵo, kaj kiu entenas la universalaĵon de la rilatoj inter ĉiuj homaj estaĵoj de ĉiuj tempoj, inter ĉiuj civitanoj kaj civitaninoj, videblaj aŭ nevideblaj, de nia komuna Homaro.

Kia do devas esti la karaktero de la homara spiritismo? Estu permesate al mi, ne antaŭenmetante alian respondecon ol la mian, ĝuste eldiri mian opinion. Mi pensas ke ĝi bezonas oviti tiun hipnotigon de la abismo kaj de la absoluto, tiun vertigon de la mistero kiun oni nomis mistikismo, kaj kontraŭ kiu, dum aliaj epokoj, la aventuristoj de la nevideblo povis troviĝi sendefendaj, pro manko de kompasoj uzeblaj por ĉiuj, t. e. de orientado devenanta de ĉena intersekvo de konoj pozitivaj. (Mi jam de longe diris

aliloke (1), kaj ripetas : la nuna alveno de la spiritismo libere konsiderata estas unu el la plej rimarkindaj pravigoj de la « leĝo de la tri statoj », formulita de Auguste Comte ; ĝi pruvas ke la koncepto pri la senmorteco, post kiam ĝi montriĝis laŭ la stato teologia, poste laŭ la stato metafizika, komencas eniri la fazon pozitivan). Ferminte la parentezon, mi daŭrigas. Estas du manieroj laŭ kiuj oni povas sin dediĉi al la aferoj de la transo ; ĉu, — ne ankoraŭ kuraĝante plilarĝigi sufiĉe sian vidon por interesiĝi per unu sama rigardo pri duobla objekto — oni tial indiferentiĝas pri la tera medio ; ĉu, — sufiĉe pligrandiginte sian koncepton, — oni interesiĝas samtempe pri la tera vivo kaj pri la transtera, laŭ harmonia sintezo. En la unua okazo, ĝi estas la malligo ; ĝi estas la mistikismo. En la dua okazo, ĝi estas la *kunligo*, ĝi estas la celado por unuigi la du modojn de la homa speco ; ĝi estas, unuvorte, la penado al *Homaro Integrala*.

La duobla kunligo, de la vivantoj inter si kaj de la vivantoj kun la mortintoj, la interrilatigo de ĉiuj individuaj inteligentaĵoj kiuj evoluis sur nia mondo, la prilaborado de kolektiva konscio per la universaligo de la rilatoj inter ĉiuj tiuj inteligentaĵoj, — tia esti ŝajnas al mi, pri siaj esencaj punktoj, la programo de la penadoj kiuj karakterizas nian epokon.

La Homaro serĉas sin, ĝi serĉas sian *mi*, sian konscion de giganteca organismo, sian mondan personecon, — se oni povas tiel diri. Tio ne estas senpraviga certigo. Ĝi estas libera traduko de faktoj realaj, de evidentaj simptomoj.

Inter tiuj simptomoj, unu el la plej rimarkindaj, el la plej potencaj, estas la neforpuŝebla movado kiu ĉie sur la tero instigas la homojn al deziro kaj uzado de komuna lingvo. Kio ajn povas esti la komprenilo inter la transanoj, sur la tero ni nepre bezonas lingvon internacian, se ni volas la

(1) En la Antaŭparolado (Enkonduko) de *La Krizantemoj de Marie* (franca verko).

plenan komunikeblecon inter la teraj homoj, t. e. en la tera parto de la Homaro integrala. Do helpa universala lingvo estas necesega kunetikanto en plena programo de la koncepto tie ĉi prezentata.

Sed, ĉar la du partoj, surtera kaj transtera, de nia komuna Homaro estas intersolidaraj, kaj tial ne povas ne influi unu sur la alian, estas verŝajne, se nia konvinko estas prava, ke en la transo, almenaŭ tiom kiom sur la tero, multaj niaj gefratoj interesiĝas ankaŭ pri la sama demando ; ĉar tiu demando interesas parton, do solidare la tuton, kaj sekve la alian parton : — eĉ supozante ke la transanoj ne bezonas mem la saman komprenilon. Mi inklinas por pensi ke aroj de tre progresintaj transanoj ne nur interesiĝas pri surtera internacia lingvo, sed ankaŭ tre klopodis mem por instigi serĉemulojn en tian vojon ; kaj, inter tiuj aroj, la plej luma, la plej konstanta, la plej potenca, la plej geniiga, estas kompreneble, laŭ tia hipotezo, tiu kiu harmoniigis kun la cerbo de nia genia majstro L. L. Zamenhof. La tiel instruoplena *Letero pri Dekono de Esperanto* tute akceptebligas tian hipotezon, — dum ĝi helpas ankaŭ kompreni kial la zamenhofs elpensado, pro longa, konstanta, kvazaŭ gravedeca laborado, superas nature ĉiujn aliajn samcelajn sistemojn. Jen, ekzemple, kion tie ni legas : « La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe min — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis ; mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo ». Iom pli poste : « Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ĉio ne fariĝos tiel facile, kiel ĝi prezentigis al la infano ; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti ». Kaj ankaŭ : « Dum 5 1/2 jaroj de mia estado en la universitato, mi neniam parolis

kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo — la jaroj de studento — pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafaje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj « Mia Penso » mi metis poste en la unuan broŝuron eldonitan de mi; sed al la legantoj, kiuj ne sciis, en kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis stranga kaj nekomprenbla. Jen, ekzemple, kiel tiam kantis la juna studento Zamenhof:

«... Kion havis mi plej karan —
La junecon — mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta !

Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, —
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
Mia peno kaj laboro —
Venu tuj al mi la morto,
En espero — sen doloro ! »

Feliĉe, lia peno kaj laboro plaĉis al la sorto; kaj la *io*, kiu pelis lin for de mokemaj gajuloj, nun pli kaj pli penetrigas lin en la grandegan noblan ĝojon kiu venas al li per la dankado fervorega de la tuta Esperantistaro.

Sed kio povis esti tiu *io*, se ne fortiganta, kuraĝiganta atmosfero nevidebla, se ne, kredeble, amikaro altspirita, kiu, de lia *plej frua infaneco*, instigis lin, inspiris al li la kons-

tantan celadon, helpis lin per la unuiĝo de plej kleraj penadoj, defendis lin kontraŭ la elvojigantaj logoj (por ke « kurage kaj ne flankiĝante - li «iru la vojon celitan»), unuvorte altigis lin kaj plilumigis per la supera kunlaborado, kiun ricevas ĉiuj grandaj bonfarantoj de la Homaro? Kaj ĉu tio ne ŝajnas pruvo pri la funkciado de Homaro integrala?

En tiu grava *Letero pri la Deveno de Esperanto*, oni povas rimarki ke la aŭtoro de nia kara internacia lingvo provis kaj forĵetis diversajn sistemojn, antaŭ ol trovi la vivokapablan solvon; kaj tiu persona propramova evolucio ŝajnas resumi la evolucion mem montritan de la historio de la diversaj sistemoj prilaboritaj de multaj aŭtoroj sur la sama kampo. Kaj, pro tiu rimarko, venas iu komparo en la penson. Kiel homa embrio en la utero trapasas intersekve la diversajn malsuperajn formojn de organismoj, antaŭ ol trafi la definitivan homan formon, — tiel ŝajnas ke evoluis, en genia cerbo, per natura progresado, tra maltaŭgaj provaj gradoj ĝis la grado de vivokapableco, la fetu aliformiĝema kiu fariĝonta estis la vivanta Esperanto. (Vivanta, t. e. enhavanta «sian propran spiriton», kaj evoluonta en sia nun fundamenta formo, sed ne plu reformiĝonta). Kontraŭuloj ofte eldiris ke lingvo artefarita ne povas vivi. Sed ĉu reale Esperanto estas lingvo artefarita? Ni ĵus ekvidis, sub iu rilato, kiamaniere, per analogio, ni jam povas ĝin konsideri kiel laŭnaturen produkton.

Alia komparo, el la psika fako, sin prezentas ankaŭ, sub alia rilato, pri tiu sama temo. Oni scias ke vojaĝintoj, kiel Hue kaj Jacolliot, raportas strangŝajnajn faktojn pri la hindaj aŭ ĉirkaŭhindaj fakiroj (1). Ili rakontas ke, en kondiĉoj malebligantaj ĉian trompan artifikon, tiaj fakiroj, dank'al eksterordinara forto psika, povas influi la malvolviĝon de la

(1) Vidu: *Memoro pri vojaĝo en Tartarujo kaj Tibetlando*, de Hue; — kaj *La Spiritismo en la mondo* de L. Jacolliot. — Vidu ankaŭ: *La Spiritismo (Fakirismo okcidenta)*, de D^{ro} Paul Gibier; — kaj *En la temploj de Himalajo*, de A. Van der Naillen.

vegetaĵoj kaj tiel rapidigi ilian kreskadon ke tiuj vegetaĵoj « sukcesas, post kelkaj horoj, traŭ rezultaton kiu ordinare postulas multajn kulturajn monatojn, eĉ kelkajn jarojn. » Ekzemple, Jacolliot, aŭtoro de la ĵus cititaj vortoj, skribis ke fakiro, nomita Kovindasami (laŭ esperanta ortografio), preskaŭ tute nuda, ricevis semon de «papajo», hazarde elektitan de la vojaĝanto inter trideko da diversspecaj semoj, kaj zorgis markitan de li, — kaj ke, post du horoj, dum kiuj la fakiro estis en plena nediskutebla katalepsio, la semo fariĝis juna papaja vergeto, freŝa kaj verda, altiĝanta ĝis dudek centimetroj. — Cetere, iom similaj fenomenoj de rapidega kreskado okazis en Eŭropo, per tre rimarkinda mediumo. S^{mo} d'Espérance, kiun tre ŝatis ke kies kapablojn tre longe kaj serioze studis unu el la plej konsciencaj kompetentuloj pri la psikaj eksperimentoj, la tre estimata Aleksandro Aksakof (1). Se tiaj faktoj, kvankam tute neordinaraj, estas veraj, kiel ŝajnas al mi preskaŭ nedubable, ĉu ne aperas, per komparo, ke Esperanto similas al tiaj kreskaĵoj, ke ĝi ne estas artefarita lingvo analoga al paperaj aŭ ŝtofaj floroj de fabrikistoj; sed ke, pli ĝuste, kiel la kreskaĵoj potencigitaj per la eksterordinara forto de la fakiroj, ĝi estas laŭnatura rapidigita produkto de evolucio? Ĝia aŭtoro ne estas artefaristo de senviva afero, sed kvazaŭ fakirŝajna rapidigisto de potencigita natura evoluado. — Ĉiuj lingvoj devenas de antaŭaj elementoj, kiel de semo; kaj kion estus farinta, post multaj jarcentoj, ordinara malrapida evolucio, tion faris rapidege, sed tamen laŭnature, la eksterordinara genia potenco kiu ĝermigis kaj kreskigis Esperanton. (2)

(1) Vidu *Animismo kaj Spiritismo*, de Aleksandro Aksakof (1^a ĉapitro).

(2) « D^{ro} Zamenhof nenion kreis, nenion fabrikis; li simple kombinis la komunajn elementojn de niaj eŭropaj lingvoj kaj ilin kunigis por formi lingvon apartan, sed kiel eble plej proksiman al la niaj. Jen kial, funde, Esperanto nenion havas artefaritan nek arbitran ». — **Carlo Bourlet**, en *Esperanto* de 5 Marto 1910 (franca aldono).

Kaj tio estis vere feliĉa fariĝado; ĉar jam venis la tempo kiam kreskanta interkomunikado de la homoj bezonas komunan komprenilon, kiam renoviĝanta Homaro nepre postulas internacian lingvon. Ĝin bezonas la praktikaj aferoj de la homoj, kaj ĝin postulas la plenkreskado de la Homaro, ĉu simple tera, ĉu, sekve, integrala. Ĉar, por plenumi sian propran estadon, Homaro devas starigi ĉiam plimultenombrajn interrilatojn, ĝi devas pli kaj pli faciligi la interkomunikadon de la simpatioj, ĝi devas naski la plenan interkoran atmosferon kiu ebligos la malvolviĝon de la amado universala. (1) La demando pri la evolucio de amo estas vasta, kaj tial mi ne povas nun ĝin ekstrakti. Mi diras nur, pri la konkludo, tia kiel mi ĝin ekvidas, ke, en celinda harmonia stato, kiam oni amas la aliajn, oni estas si mem kaj, plie, oni estas ankaŭ la aliaj (2); tiam oni estas rilato dio. Kaj (ĉiam altiĝante per la vojo de la progresadantaj harmonioj) se iam, en la senfina estonto, oni sukcesos ami ĉiujn gefratarojn de ĉiuj sennombraj Homaroj de la Senlimo, tiam oni estos si mem kaj ankaŭ oni estos samtempe la sennombraj spiritaroj de la tuta universo; ĉar oni sentos sin partoprenanta en ilia unuiĝo, en ilia Unuo; tiam oni estos plene dio en la konscia harmonio de la Granda Tuto, aŭ, por diri la samon per alia esprimo, oni estos plene

(1) Oni povas supozi ke la Telepatio, eble kun helpo de la komuna lingvo, havos rolon en tiu agado; sed mi ne povas ĉion preparoli en la nunaj paĝoj. — J. C. C.

(2) « Ni ekkriis, levigante per sama samtempa salto: « Ni ne estas du! Ni estas unu sola estaĵo sub du naturoj » kluĵ nin erarigas. Kiu diros *vi* al la alia? Kiu diros *mi*? « Ne estas *mi*, ne estas *vi*, estas *ni*!... » Kaj ni refalis (kvazaŭ) neniigitaj de admiro pri tiu mirinda konformeco, plorantaj je tia feliĉego: nin senti duoblaj estante nur unu, aŭ prefere nun esti nur unu animo en du korpoj! » — **A. de Lamartine**. RAFAEL'. CXII.

Kio ebla estas malgrande estas ankaŭ ebla pli grande. — J. C. C.

dio en Dio. Amo estas la sola vera pligrandigilo; ama celado estas la sola ĉiopova ambicio. — Sed, kiel ajn oni devas konsideri la demandon pri amo, certe estas, koncerne nian mondon, ke tutmonda komprenilo neeviteble enhavas en si internan amigan forton, kaj ke, se nia komuna celo estas ami unuj la aliajn por naski veran Homaron, tiu mirinda komprenilo, tiu esperplena lingvo estas unu el la plej dankindaj faktoroj en la plenumo de nia destino.

Sed, por ke tiu destino ne restu iluzia, ni devas aldoni ke la sola tiel konceptebla Homaro estas Homaro de senmortuloj. Kaj, ĉar nova pozitiva scienco certigas al ni nian senmortecon, ni ĉiuj ĝoju do pro antaŭvido de lumplena dia horizonto, kie ĉiuj ni reciproke nin amos, amos por eterne.

J. CAMILLE CHAIGNEAU,

(elp. : Kamij' Ŝenjo').



Esperanto-Spiritismo

La Historio atestas ke de la plej malproksima antikveco ĝis la nuna tempo, post la grandaj batalantoj, ĉiam iris la sacerdotoj kaj la instruistoj. Tio plene pruvas ke oni konsideris ĉiam la lingvon kaj la religion kiel la plej gravajn faktorojn por la unuigo kaj la fortigo de la popoloj.

Tiu koncepto tiel universale akceptata kaj praktikata, elfluas de la observado de la regula kaj ĉiama fakto ke ĉiu sin sentas unuigita per mistera ligilo al ĉiu alia kiu parolas sian propran lingvon kaj havas la saman kredon, ne malpli intense kiel al la tero, kie li naskiĝis, kaj al la personoj kiuj lin ĉirkaŭis dum lia infaneco. Tio estas speco de plilarĝiĝo de la familia ligilo, estas speco de spiritala unuigilo kiu naskas fidon kaj fortecon al la proponoj.

Vanaj estis kontraŭ tiu natura efeko ĉiuj malaj intencoj kaj estas kurioza tio kio okazas jam al la apostoloj mem de nunaj krucbataloj. Oni aŭdas ilin propagandi la forpelon de la landlimoj, la malaperigon de la homaj klasoj, la unuecon de la homaro, la Universalan Patrujon! sed ili ne ĉesas esti Francoj, Hispanoj aŭ Hinoj, ili ne ĉesas preferi sian naskiĝan teron kaj naskiĝan lingvon, ili ne ĉesas admirari la religion de sia popolo, kun pli granda bonvolemo ol tiun de iu ajn alia popolo, kvankam ili neniel komuniigas laŭ ĝi, kaj teorie mezuras ĉiujn religiojn per la sama mezurilo.

Tamen la universala frateco kaj la forpelo de la homaj klasoj kaj landlimoj estas faktoj pli aŭ malpli tujaj, ili estas jam realaĵo en la idea mondo kaj ĉio, kio en tiu mondo estas vera, vera estos en la mondo de la objektaj fenomenoj. En tiu ĉi okazo por kristaliĝi nur mankas al ili la ĝusta ligilo, kaj tiu ligilo bone povus esti «Esperanto».

Malsame de kelkaj aliaj lingvoj kiuj pretendis universaliĝi, Esperanto ne celas anstataŭi la aliajn lingvojn, sed nur servi kiel helplingvo, post ĉiuj aliaj. Eble Esperanto alvenos al la pozitiva Universaligo, plenigante tiamaniere la evangelian apoteĝmon, kiu diras «kiu malaltigas sin estos altigata».

Eĉ se tio ne estos, oni ne povas nei ke ĝi estas en pli bona vojo por atingi tiun celon ol iu ajn alia el ĝiaj samspecaj antaŭintoj. Almenaŭ ĝi malakordiĝas kun neniuj lingvoj vivanta kaj, ne malamikante kun ili, ĝi ne devas timi ilian grandegan idearon. Estas eĉ plimulte: Esperanto ĉerpante sian vortaron kaj gramatikon el ĉiuj direktoj, ĉiuj lingvoj vidas en ĝi ŝleton, kaj ĉiuj ĝin miras kun la ĝentileco, kun kiu oni miras sian idon. De tie ĉerpas Esperanto sian fortigan nutraĵon kaj de tie elfluas ĝia mirinda disvastiĝado.

Poste se estas la lingvo, kiel ni jam vidis, unu el la plej efikaj iloj por la unuigo kaj la fortigo de la popoloj, kaj se Esperanto estas per sia virteco, kaj divastiĝeco, tiu spiritala unuigilo, ĉu estas stranga, ke al Esperanto estis rezervata la neniam mortonta gloro, doni korpon kaj sangon al

la milfoje karesita ideo, fari de la popoloj unu solan popolon, kaj de la homoj unu solan homon.

Ni kontentigu nin tamen per tiu fakto ke Esperanto nur servas por tio, por kio nun ĝi povas servi, t. e. por komuniki senpere la ideojn por ke tiuj ĉi intertuŝiĝu, kaj diskutiĝu por ke ni komprenu la homojn, kien ajn ni iros kaj por ke ili nin komprenu; por ke fine, per ĝi niaj rilatoj iĝu facilegaj.

Ĉu estas malmulte?

Ĉu tio ne estas misio tute belega?

Ĉu ĝi ne meritas pro tiu nura fakto, esti alprenata de ĉiuj kiuj amas la bonon?

Alia ligilo por solidarigi la homojn, ni vidis ke estis la religio.

Nia jarcento de pozitivismo kaj kritiko ŝajnas ke ne havas iun religion, aŭ ke tiu, kiun ĝi havas, estas ege malfortigata. Laŭvere ne estas tiel. Ni havas almenaŭ tiom da religieco kiom havis niaj praavoj, kiuj oferbuĉis siajn samulojn aŭ sin mem, sur altaroj de iu kredo.

Io, kion ni ne havas estas tiom da fanatismo, kaj tio, kiel rezultato de la progreso, estas justa kaj saniga. Oni konfuzas ofte la religion kun ĝiaj praktikoj kaj el tio elfluas multe da eraroj.

Ni demandu al katoliko, al protestanto, al budisto k. t. p. ĉu li konsideras religia tiun personon, kiu ne komuniĝas laŭ liaj praktikoj, kaj ni obtenos neŝanĝeble nean respondon, escepte se nian demandon ni adresis al klera kaj liberala spirito. Tiu fakto naskas la ĝeneralan sed eraran opinion ke la religieco malkreskas, kaj naskas ankaŭ la ridindan kaj monstran opinion laŭ kiu Sokrato, Platono, Jesuo, Luizo de Granada, Molinos, aŭ Victor Hugo estas religiaj por kelkaj malmultaj, kaj malreligiaj por la plej multaj.

Sed la religio ne estas ĝia praktikado, same kiel la amo ne estas la kiso, kaj la ideo ne estas la vorto per kiu ĝi sin esprimas. Oni povas esti religia ne estante kristano, aŭ mahometano, eĉ ne komuniĝante sur iu altaro, eĉ estante

ateisto. La religio ne estas teologia virto, ĝi estas morala virto, kaj la moralo estas ŝaŭrligita en neniuj teologio, en neniuj dogmo, en neniuj diaj servoj, nek formulo de sakramento. Tio pruvas ke oni povas esti religia ne estante kredanto, kaj ke ne sufiĉas esti kredanto kaj praktikanto de iu kredo por esti religia.

Ke la kredoj, kaj diaj servoj, ĉiam iras la vojon al sia malaperiĝo estas veraĵo nedubbla, kaj ili ĉiam pli kaj pli iros tian vojon laŭmezure ke kreskos la kritikismo kaj ke tiu ĉi ĝeneraligigos kaj ĉien eniĝos. Estas la laboro de la racio, de la libera ekzameno kaj de la scienca pozitivismo kiu forpelis la laŭdogman kredemon kaj ruinigis la miraklon. Hodiaŭ ne ekzistas kredo en tio, kion la spirito ne vidas, kaj eĉ en tio kion ĝi vidas restas al ĝi sufiĉa parto por la dubo.

La dubo, tamen, ne estas nutraĵo por la spirito. Estas ĝuste la malo.

Dum la transira periodo, tra kiu ni pasas, en la stato de febra pensado kiu estas komuna al ni ĉiuj, ĝi, sendube, plenumas sian taskon; sed tiu stato forpasos, kaj, laŭmezure ke ĝi foriros, oni sentos kreski la bezonon de pli fortiga nutraĵo. Kio povos doni ĝin?

Nur, la kredo kiu, havante por fundamento la faktojn kaj konsiderante la aĵojn laŭ principoj fiksa kaj nedubblaj, plenumas egale la bezonojn de la racio kaj tiujn de la sentimento.

Ĝi ne trudas al ni iun dogmon, ĝi invitas nin al la studado, ne proklamas sin la vero, ĝi nur diras tion kio estas vera. Ĝi ne kondamnas tiun, kiu en ĝi ne kredas, ĝi nur instigas lin ke li daŭrigu serĉadon analizante kaj juĝante; konvinkita ke la progreso estas senfina, ĝi konfesas ke ĝi diris la unuan vorton sed ke neniuj diros la lastan. Tia estas ĝia celo: starigi la sciencan integralan kaj laŭprogresan, kiu deklaras ke, se novaj malkovroj elmontros ke ĝi estis eraranta en iu punkto, ĝi tuj ŝanĝiĝos en tiu punkto. Estas pro tio ke ĝi devas esti eterna.

Irante kune kun la scienco, ĝi neniam restos malantaŭe. Malgraŭ ĉio, kion la estonto povos alporti, ĝi ĉiam povos nutradi la racion kaj la sentimenton per la bonegaj nutraĵoj de la metafiziko, de la fiziko, kaj de la psikologio eksperimenta.

ESPERANTO. Lingvo tutmonda, kiu estas la ilo per kiu ni ĉiuj estantoj povos interrilatiĝi.

SPIRITISMO. Scienco-religio, kiu, ne submetante nin al la superrego de iu dogmo, plenumas egale la racion kaj la sentimenton.

Ili ĉirkaŭbraku unu la alian, kaj por la tero leviĝos la regado de la vera Frateco.

tradukis A. S.

Quintin López,
Tarrasa.
Prov. de Barcelona
Hispanujo.



La rolo de Esperanto rilate al Spiritismo

Kiel Esperantistoj lernintaj la evolucion de la multenombraj sistemoj provitaj por starigo de universala lingvo, kaj pripensintaj la gravan *Leteron* de D^{ro} Zamenhof *pri la deveno de Esperanto*, ni fidas la senfinan destinon de tiu genia lingvo. Sed ĉiuj sinceraj idealaj pensoj estas konindaj, kaj ni opinias ke la tre klera artikolo de S^{ro} Kavaliro Le Clément de S^t Marçq plene interesos niajn legantojn, tiom pli ke, laŭ la praktika vidpunkto, li tute akordiĝas kun ni, konkludante : - Ni leraŭ Esperanton ! -.

La tiel mirigantaj fenomenoj spiritismaj konsistas granda parte el parolataj manifestaĵoj : komunikaĵoj ricevataj per la tablo, per la mediuma skribo aŭ per la enkorpiĝo.

Unu el la plej gravaj elementoj de tiuj faktoj do estas la lingvo uzata. Estas certe ke kiam oni vidas personon malbone instruitan produkti en tranca stato kelkajn liniojn apartenantajn al lingvo entute nekonata de la subjekto, oni povas trovi en tio brilantan elmontron de la interveno de ekstera pensulo kaj konsekvence unu el la plej bonaj pruvoj pri la vereco de la fundamentaj ideoj de Spiritismo, t. e. de la ekzisto ĉirkaŭ ni de estaĵoj inteligentaj kiuj maltrafas niajn ordinarajn sentojn kaj kiuj tamen kapablas komuniki kun ni uzante specialajn perojn.

Se do la Jehovah de la Biblio ne estus konfuzinte niajn lingvojn je la epoko de la konstruado de la Babelturo, se ĉiuj homaj estaĵoj esprimiĝus laŭ unuforma maniero, ni estus perdintaj la okazon konstati la rimarkindan fakton de

mediumo parolanta aŭ skribanta lingvon, kiun neniam li lernis, tiel kiel la apostoloj de la Kristana Religio post la malsupreniro de la Spirito sankta.

Sed tiu rimarko tamen ne devas konduki la spiritistojn ĝis la deziro ke tiu lingvokonfuzo ĉiam daŭru. Male, la efektivigo de unu sola parola komunikilo inter ĉiuj loĝantoj de la tero nur estus kunhelponta por igi pli multenombraj kaj pli klaraj la komunikadojn ricevotajn per mediuma pero.

Por ekkompreni la influon kiun tia lingvotransformado povus alporti al la mekanismo de la rilatoj inter la mondo videbla kaj la mondo nevidebla, ni devas fari unuan demandon :

Ĉu la pensantuloj kun kiuj spiritismo igas nin komuniki konas ĉiujn lingvojn ? aŭ ĉu ili posedas alian mekanismon por transdoni siajn pensojn, kiu al ili ebligus malbezoni elparolatan lingvon ĉe iliaj intelektaj interrilatoj ĉu inter ili, ĉu kun ni ?

Ni ekzamenu unue tiun lastan supozon.

Ĉu estas eble pensi sen vortoj ?

Nia persona sperteco al ni montras ke por ĉiu ideo kiu estas figuro, kiun la vida imago kapablas rekonstrui, la vorto ne estas necesa. Por retrovi kun ĝiaj plej etaj detaloj la aspekton de konata pejzaĝo, neniu bezono estas rememori la nomon de la loko nek fari al si mem priskribon de la vidaĵo kiu rekonstruiĝas propramove.

La fortigitaj ekstremaj formoj, tre markitaj de niaj sentoj estas ankaŭ kapablaj frapi nin, kvankam ni ne sentas la necesecon nomi tiujn ŝanĝojn de nia animo per iu vorto.

Fine gesto simpla aŭ eĉ serio da agoj iomete komplikaj kiam ili okazas en loko sufiĉe familiuma por ke ni povu revidi en ni mem ĉiujn detalojn kaj ĉiujn rimedojn kiujn ni bezonas, povas ankaŭ konkretiĝi klare en nia spirito sen la kunhelpo de lingvo.

Ĉio kio estas bildo, akra sento, simpla gesto, do povas pensiĝi sen parolo kaj esti transdonata al la spirito de aliulo sen la pero de iu parolo.

Sed tiam kiam estas necese diskuti pri estontaj eblecoj malbone klarigitaj, kiam oni devas klasigi multenombrajn kaj konfuzajn ideojn, kiam oni devas decidi en malfacilaj situacioj, la kunhelpo de la interna parolo iĝas utileco nedubebla ; ĝi estas eĉ necesajo.

Ĉiufoje do, kiam la objekto de ideinterŝanĝo, kiu okazigas la fenomenojn spiritistajn rilatos al spiritismaj aferoj, la fenomeno devos necese manifestiĝi en parola formo kaj depost tiam al ni prezentigĝas tiu demando, esprimita unue : Ĉu la spiritoj konas ĉiujn lingvojn ?

La konoj kaj la kapabloj de la estaĵoj kun kiuj ni rilatas, aŭ ŝajnas rilati, dum la fenomenoj spiritismaj, estas ankoraŭ malbone determinitaj ; kredeble la homaro fosos ankoraŭ multe da jarcentoj eble la sulkon de la psikaj studoj antaŭ ol esti povanta precizigi la solvon de ĉiuj problemoj kiujn la difino plena de la nevidebla mondo enhavas. Tamen se ni nur konsideras kun modesteco la rezultatojn kiujn ni havis persone la okazon konstati, ni devas diri ke al ni okazis multfoje obteni komunikadojn enhavantajn deklaraĵon laŭ kiu la komunikinto ne estis konanta la lingvon kiun ni uzis (la francan) kaj petis de ni ke ni uzu ĉu la flandran, ĉu la anglan.

Se ni akceptas ke en tiuj specialaj okazoj la komunikaĵo estis vere aŭtentika kaj sincera, la demando kiun ni elmetis ĉi supre estas do solvita.

Ni supozu do mediumon pretiĝantan por ricevi la inspirojn kiuj estas donantaj la pruvon de sia interveno per lia pero, nia imago al ni prezentas la scenon per la aspekto de individuo ĉirkaŭita de iu nombro da spiritaj formoj. Inter tiuj ĉi, kiom multaj parolas la lingvon de la subjekto ?

Se ĉiu mediumo havas ĉirkaŭ si la ordinarajn akompanantojn en la nevidebla mondo, tiuj ĉi tre kredeble estos havintaj la tempon kutimiĝi kun la idiomo de la subjekto ; ŝajnas ke estas tiel. Sed flanke de tiuj ĉiamaj akompanantoj ŝajnas interveni personoj pasantaj kaj por tiuj, pro manko de aliaj taksaj rimedoj ni povas opinii ke la probableco de

ilin trovi kapablaj esprimiĝi per la lingvo de la mediumo estos egala al la rilato inter la nombro da homaj estaĵoj parolantaj tiun lingvon kaj la entuta cifero de la loĝantaro de la globo. Por precizigi tiun metodon de konsiderado, se ni ĝin aplikas al la franca lingvo, kalkulante je 40 milionoj la nombron de homaj estaĵoj esprimiĝantaj tiamaniere, kaj je 1600 milionoj la tutan loĝantaron de la globo, ni ekvidas ke la probableco ke iu ajn spirito komprenos la francan lingvon estas de 1/40.

Se nia mediumo nur parolas france, el 40 pasantaj spiritoj, kiuj tuŝos lin, nur unu estos kapabla igi lin skribi aŭ paroli senpene. La aliaj povus eble, se la mediumo estas tre lerta, tre ekzercita, tre kapablohava, sukcesi igi lin skribi aŭ paroli en sia propra lingvo, sed tio nur estus farota kun granda malfacileco kaj post grandaj penadoj.

Kalkulante po duono la medianan partoprenon de la konstantaj eroj kaj po duono tiun de la spiritoj kiuj nur vizitas momente la mediumon, ni povas jesi, apogante nin sur la konsideraĵoj kiuj antaŭas, ke, se unu sola lingvo estus parolata inter la homoj, la fruktodoneco de la mediumoj estus kreskanta en fakto simila al tiu, kiun ni ĵus konsideris, laŭ la proporcio de unu al du (ĝuste la rilato de 41/80).

Se Esperanto estus sufiĉe disvastigita por formi anaron nombre takseblan, ĝi povus jam kunhelpi por kreskigi la nombron de komunikaĵoj kiujn mediumo kapablu ricevi. Tamen en komparo kun la grandega maso da homaj estaĵoj, ĉu la rezultato kiun estas eble obteni per la kreo de lingvo artefarita povus iam pezi iomete en la pesilo de la spiritaĵoj interrilatoj? Ni ne volas nei tion, sed ni devas tamen konsideri tiun eventualaĵon kiel unu el tiuj kiujn nur longa atendo permesas esperi.

Tio ne estas motivo por ke ni malinteresiĝu, kiel spiritistoj, je la Esperanta afero. Estas eĉ juste kaj saĝe ke ni al ĝi donu nian helpon, ĉar tiu celado nekontesteble kunhelpos

en la estonto por faciligi la intelektan komunio de la animoj.

Ni demandis ĉi supre ĉu la spiritoj estas konantaj ĉiujn lingvojn. La momento alvenas por fari al ni novan demandon. Ĉu ne oni povas akcepti ke, same kiel spirito transdonas sian penson al mediumo, same al li estas eble sekvi atente tion kion homa estaĵo faras, pensas aŭ diras, kaj agante tiamaniere en fremda lando ĉu li ne sukcesus sin moti rapide en staton por kompreni la lingvon de la lando?

Estas do prave akcepti ke la spiritoj povas ellerni novajn lingvojn kaj, sekve, kial oni ne petus ilin, ke ili fariĝu propagandistoj de Esperanto en la mondo nevidebla?

La idemovado kiu havas kiel celon la disvastigadon de tutmonda helpa lingvo estas do favora je la kreskado kaj la praktikado de spiritismo kaj ni devas al ĝi konsenti ĉiujn niajn simpatiojn. Sed ne konvenus ke tiu inklino, ankoraŭ tri limigita en sia celo kaj en sia rezultato igu nin ne plu vidi idealon pli altan, kredeble pli malfacile atingeblan, sed apud kiu ni ne povas pasi ne provante almenaŭ sentigi ĝian tutan grandecon al tiuj kiuj tion legas.

Ĉu ne estus vere ke la diverseco de lingvoj rezultas de eraroj faritaj en la kreo de la vortoj, eraroj poste konservitaj kun nefleksebla obstino per la klerulaj asocioj kiuj fariĝis gardistoj ĵaluzaj de ĉiu dialekto?

Ĉu ne ekzistas lingvo natura, iu vera lingvo kies ĉiuj aliaj, parolataj de la loĝantaro de la tero, nur estas aliformaĵoj eraraj? Tiu natura lingvo devus esti tia ke oni ĝin komprenu eĉ ne ĝin lerninte; ke ĝi okazigu per la natura virto de la silaboj elparolataj la kreon mem de la intencata bildo en la spiriton de la kunparolanto. Se tia lingvo ekzistas, ĉu ni ne devas fari ĉiujn penadojn por serĉi ĝin, por ĝin restarigi? kaj se vi akceptas tiun devon, vi al vi kredeble tuj demandos kiel estus eble efektiviĝi tiun celon.

Necese estus ordigi la silabojn, retrovi ilian devenan sencon, dismetante ĉiujn radikojn, ilin interkomparante, pripensante la ĝustan valoron de la signo formita per la voĉa

organo je l'momento de la eligo de la studata sonoraĵo. Tio kredeble estas laboro vastega, kiun nur jarcentoj da sindona penado, unuigante milojn da partoprenantoj, povus sukcesigi.

Unu ekzemplo, la plej simpla, sufiĉos por sentigi samtempe la manieron per kiu estus eble agadi kaj la eblecon efektiviĝi tiun esperon, ŝajne ĥimeran.

La pronomoj esprimantaj respektive la unuan kaj la duan personon estas signoj el la plej simplaj de la lingvo. Nu, promenante tra gramatikoj plej diversaj, ni konstatas, ne sen miro, ke la unua persono rilatas preskaŭ ĉie al gorĝa elparolo, kiu estas kvazaŭ movo de lango faranta la geston montri la subjekton. Estas tiel ke Flandro diras « ik », Latino kaj Greko, « ego »; Hebreo, « onki »; Tibetano, « nga »; Sanskrito, « aham »; Ĥino, « ngo ».

La dua persono estas ligita al dentartikaĵo kiu estas ankoraŭ la langa gesto montranta la personon al kiu oni parolas. France, « toi »; Latine, « tu »; Hebreo, « atoh »; Tibetane, « khiod »; Sanskrite, « tvan »; Ĥine, « ni ».

Aliaj komparoj povus esti farataj, oni povus serĉi tiamaniere kiu estas la speciala senco kiu diferencigas la konsonantojn dolĉajn de la konsonantoj fortaj, la simplajn de la spirantaj aŭ ankaŭ kio-karakterizas ĉiun vokalon kaj ĉiun diftongon.

Posedante la valoron de ĉiu el tiuj eroj oni facile sukcesos per pripensado malkovri la senco kiu rezultas de ilia kombino. Ni supozu, unu momenton, ke tiu lingvo tutmonda, tiel klara, tiel simpla, tiel luma estus retrovita kaj restarigita. Kiun mirindan ilon la homa penso en ĝi trovas! Kiel ĉiuj agadoj de la spirito estus igitaj pli akurataj, pli profundaj! Kaj kiel la kunligo de la konceptoj efektiviĝus nature per la apudigo de sonoraĵoj!

Tia lingvo, cetere, ne nur estus tutmonda, sed estus la vera lingvo universala, t. e. tiu, kiun oni parolas kredeble en ĉiuj aliaj mondoj de la Universo kie ekzistas estaĵoj organizitaj kiel ni.

Koni ĝin, ellerni ĝin, estus do pretiĝi por posedi la porolan ilon de kiu oni neniam plu devos disiĝi kaj kies praktikadon oni povus daŭrigi en la senlimaj antaŭvidaĵoj de la eterna vivo.

Sed ni ne lasu nin forporti senpripensense al tiuj antaŭvidaĵoj ankoraŭ tro malproksimaj kaj tiel malfacile atingeblaj ke ili povus nin malkuraĝigi. Ni konservu pie tiun esperon en nia koro kaj atendente la feliĉan tagon, kiam ni povos ĝin alproksimiĝi, ni limigu niajn ambiciojn je la efektivigo de laboroj pli atingeblaj, ni pensu pri la estanto kaj ni lernu « Esperanton ».

CHEVALIER LE CLÉMENT DE S^UMARCO.

Tradukis A. S.



Kio estas Spiritismo?

(Artikolo speciale verkita por la nuna esperanta libreto)

Por respondi la demandon kiu estas temo de ĉi tiu artikolo, utile estas alĵeti rigardon sur la nunan staton de la problemo pri ekzisto kaj senmorteco de la animo. En Eŭropo, dum multaj jarcentoj, la religio katolika superregis kaj sufiĉis por kontentigi ĉiujn sciemojn pri la « transo » (pri kio okazas trans la morto). La dia revelo estis fiksinta la sorton de ĉiuj estaĵoj. La bonuloj, tio estas kiuj obeas flekseble la Eklezion en la persono de ĝiaj riprezentantoj, aliris la Paradizon, feliĉegan lokon iom malĝuste konitan, sed kiun oni supozis esti trans la firmamento. La malbonuloj — la nekredantoj, la maljustuloj — estis destinataj por suferi terurajn malfeliĉadojn en la Infero, kie legioj da demonoj turmentegis ilin dum la eternado. La purgatorio kaj la limboj estis lokoj intermezaj en kiuj la estontaj elektuloj

pagis sian ŝuldon, korektis sin, ĝis la momento de ilia aliro en la ĉielon.

Tuj de la « renesanco, » inaŭguriĝas nova tempo, la liberekzamena spirito malvolviĝas. Galileo pruvmontas ke la tero rondiras, ke ĝi ne estas la centro de la mondo, ke ĉio ekzistanta ne estis farata po ĝi. Tiam la universo pligrandiĝas nemezureble, kaj nia malgrava planedo de nun estas nur punkto nedistingebla en la senlimo de la mondoj. La kosmologio de la Biblio, same kiel la dogmo kiu sur ĝi sin apogas, ricevis de tio frapon el kiu ĝi ne releviĝis; ĉar la geologio, siavice, pruvis al ni ke la kreo de la mondo laŭ sep tagoj kaj tiu de la homo estas nur infanaj legendoj. Poste venis la enciklopediistoj kaj la laboroj de la scienculoj de de la XIX^a jarcento, kiuj montris kiom la instruadoj de la katolikismo estas kontraŭaj al la racio kaj al la scienco; pro kio, postvenis la kredon nereduktebla skeptikismo.

La homa spirito estas tia ke ĝi iras ĉiam al la ekstremoj. La reenago kontraŭ la religio alkondukis la triumfon de la teorioj materialismaj, kiuj nuntempe estas alprenitaj de la plimulto el la kleruloj en la tuta mondo. Aliparte, la filozofoj spiritualistaj, je la sekvo de Descartes, igis la ideon pri animo preskaŭ nekomprennebla, kavigante fosaĵon netransireblan inter la penso kaj la materio, tiamaniere ke la demando pri ekzisto de la animo, konsiderata kiel individuaĵo diferenca de la korpo, fariĝis por multaj problemoj nesolvebla. Ĉu do ni devas rezigni la esperon scii, pri tiu temo, kio estas reale? Mi tion ne kredas; sed, anstataŭ argumenti ĝis neatingebla, ĉikanante pri la diskutataj punktoj, ni devas forlasi la kampon de la metafiziko por tiu de la scienco, t. e. ke estas preferinde ataki la problemon per la eksperimenta metodo kiu uzas observadon kaj eksperimentadon. Estas tiu irado kiu, de tri jarcentoj, igis nin plenumi la gravegajn progresojn kiujn oni konstatas nuntempe en ĉiuj fakoj de la sciencoj. Ĉu tia serĉado estas efektivegebla? Ĉu oni povas submeti la animon al precizaj metodoj de observado ekstera? Mi ne hezitas respondi ke tio estas science farebla.

Jen kie spiritismo aperas kun sia tuta originaleco. Flanke lasante la teoriajn diskutadojn, ĝi aliras rekte la demandon pri faktoj. Ĉu estas eble, jes aŭ ne, konservi rilatojn kun tiuj kiujn oni nomas la mortintoj? La moviĝantaj tavoloj, postvenante la « hantaj » fenomenojn, estis la unuaj iloj ebligantaj starigi komunikojn kun la nevidebla mondo. Komprenneble, ne temas tie ĉi pri supernaturo nek pri mirindo, kaj inter la sennombraj rakontoj publikigitaj pri tiu objekto, ni devas forigi ĉiujn fantaziajn fabelojn kiuj estas senvaloraj. Ni konsentu nian konfidon nur al homoj plene indaj, per ilia scio, por esti gvidantoj en tiaj esploroj. Necesege estas ke oni sciu ke enketoj treege multnombraj estis entreprenataj en la tuta mondo pri tiu afero kaj ke ĉiuj konkludis favore por la realeco de la faktoj. Ni do vidu rapide kiaj estas tiuj fenomenoj.

Konate estas ke, se kelkaj personoj metas siajn manojn sur tablon, rekomencante multfoje la eksperimenton, plej ofte la meblo unue moviĝas kaj poste respondas inteligente al demandoj kiujn oni faras. Oni devas do distingi du aferojn: 1^o la kaŭzon de la movo; 2^o la naturon de la inteligentaĵo kiu respondas.

La unua supozo kiu tuj prezentas sin estas ke la eksperimentantoj, konscie aŭ ne, agas sur la tablon per ĝin movi. Estas tio kion certigis Chevreuil, Babinet, Faraday, k. t. p. Sed pli atenta studo de serĉantoj kiel Profesoro Thury, Agénor de Gasparin, kaj aliaj, montris ke tiu klarigo ne estas valora por ĉiuj okazoj, ĉar ofte la meblo moviĝas *sen kontakto* de la eksperimentantoj.

La *Societo dialektika* de London (1), en 1869, post longaj serĉadoj, same konkludis. Sciencaj fizikistoj, kiel Robert Hare kaj Crookes (2), uzante instrumentojn speciale kon-

(1) *Raporto de la Societo Dialektika*, tradukita en francan lingvon de D^{ro} Dusart. (Leymarie eld.).

(2) W. Crookes. *Serĉadoj pri la Spiritualismo*. (La Angloj iam ne uzis la vorton « Spiritismo ».)

struitajn por tiu celo, igis nedubebla la ekziston de tiu forto kaj mezuris ĝian intensecon. Fotografaĵoj obtenitaj (1) de S^{ro} Ch. Richet, de Rochas, Flammarion, Lombroso, Morselli, Ochorowicz, vidigas ke objektoj flugpendas en la aero sen subportilo videbla. Estas do pruvite nun ke iu formo de la energio, kies naturo estas ankoraŭ nekonata, eksteriĝas el la korpo de iaj individuoj nomitaj *mediumoj* kaj povas ekmovi materiajn objektojn. Tiu forto obeas la volon. Tial oni donis al ĝi la nomon *forto psika*.

Kiu estas la inteligentaĵo direktanta tiun forton? Kelkafoje, ĝi estas tiu de la observantoj mem; sed, en multaj aliaj okazoj, ĝi pravas ke ĝi estas sendependa de ili, malkaŝante faktojn nekonatajn de ĉiuj ĉeestantoj. Milope atestantoj kleraj, sinceraj, tion certigas, tion en la tuta mondo. La nevideblaj estaĵoj, kies volo movas la tablon certigas ke ili vivis sur la tero kaj ili pravas sian identecon. Tio estas rekta pruvo de postvivo, kiu malecedis kontraŭ ĉiuj kritikoj; kaj, tial ke ĝi multobligis senlime, oni kalkulas nun multajn milionojn da spiritistoj tra la tuta mondo.

Poste oni rimarkis ke la tablo estas nur perilo, kaj ke, se mediumo prenas kraĵonon aŭ plumon, la nevidebla inteligentaĵo povas direkti la brakon de la subjekto kaj igi ĝin skribi vortojn, frazojn, plenajn paĝojn, kvankam tiu subjekto ne konscias kion ĝia mano skribas sur la papero. Tio estas la meĥanika skribo. Tiamaniere oni obtenis ankoraŭ pruvojn konvinkajn, tial ke la aganta inteligentaĵo

(1) Pli ol unufoje, en la ĉiusemajnaj sorbonaj kunvenoj de la Pariza Grupo, mi aŭdis la verbon «obteni», kaj neniu kompetentulo kontraŭstaris. Eĉ eminenta profesoro de superaj kursoj, demandita de mi pri tiu temo, aprobis la uzon de tiu vorto. Ĝi ŝajnas al mi tre utila, ĉar, ofte, «ricevi» ne sufiĉas. Certe, kiu obtenas, ricevas; sed, plie, li faris ion por ricevi. Aliparte, «obteni» estas sufiĉe internacia, pro la devena latina vorto «obtinere»; ĝi estas hispana, franca, angla, k. t. p. — (Noto de la tradukinto).

povis skribi same kiel dum ĝia vivado, t. e. doni aŭtografojn, kiuj estis aŭtentikaj dokumentoj ebligantaj rekoni nediskuteble la *identecon* de la nevidebla aganto. En multaj okazoj, la fenomeno sin prezentas kun tiaj karakteroj, ke ĉiu ajn alia hipotezo ol tiu de la interago de la postvivantaj animoj fariĝas logike neebla. Tio estas nome kio okazas, kiam malaltaĝaj infanoj skribas korekte, aŭ kiam la komunikaĵo esta donata per individuoj tute malkleraj. Ĉi tie ankoraŭ, la atestoj estas multegaj, kaj mi nur povas peti la leganton sin turni al la verkoj kiuj traktas pri tiu demando (1).

La pastroj de ĉiuj religiaj fakoj provis kredi ke tiuj komunikaĵoj estas faro de la Diablo. Ĉar la ekzisto de tiu mita personaĵo estas neniel certa, mi preferas sekvi la metodon logikan, kiu rekomendas ne multigi la kaŭzojn sen neceseco; tial ŝajnas al mi pli saĝe opinii ke tiuj inteligentaĵoj estas vere tiuj de homoj loĝintaj sur la tero, ĉar tion ili certigas unuvoĉe en la tuta mondo.

La pruvmontro de la ekzisto de la *mi*, de la postvivo post la morto, estas daŭrigata per la ekzameno de la fenomenoj de aperoj, kiuj povas sin prezenti propramove aŭ okazigite. De 1882, formiĝis en Anglujo kaj en Ameriko vasta asocio, nomita *Societo de Psikaj Serĉadoj*, kiu enhavas inter siaj membroj la plej altajn sciencajn eminentulojn. Tiel ĝin partoprenis fizikistoj kiel Crookes, Oliver Lodge, Barrett, membroj de la «Reĝa Societo», naturalistoj kiel Alfred Russel Wallace (la konkurinto de Darwin), psikologoj kiel profesoro Sidgwick, Gurney, F. W. H. Myers, Podmore, k. t. p., ne kalkulante famulojn el la literatura aŭ politika mondo, kiel S^{ro} Balfour kiu estis ĉefministro.

(1) Vidu: Aksakof, *Animismo kaj Spiritismo*; — Allan Kardec, *La Libro de la Mediumoj*; — Léon Denis, *En la Nevideble*; — G. Delanne, *Serĉadoj pri la Mediumeco. La spiritisma Fenomeno*; — Erny, *La Eksperimenta Psikismo*; — Gardy, *Ni serĉu*; k. t. p., k. t. p.

Aro tiel kompleta de la plej diversaj kompetentuloj certe taŭgis por lumstudi la problemojn al ĝi submetitajn. Dudektri volumoj, ĝis nun, sub la nomo *Proceedings*, kun la *Journal* (Ĵurnalo) de la Societo, enhavas la rezultatojn de ĝiaj enketoj pri la okazoj de aperoj kiuj estis komunikataj al ĝi. Oni tie trovas ankaŭ eksperimentojn pri la transdono de la penso kaj okazojn de disdubiĝoj eksperimentaj de la homa estaĵo. Tiam oni vidas ke la fantomoj de la vivantoj kaj de la mortintoj sin rivelas al ni kun nediskutebla aŭtentikeco. Tiuj aperoj enfermas en si mem pruvojn ke ili ne estas halucinoj; ĉar ofte la fantomo portas stigmatojn aŭ vundojn kiujn la vidantulo ne konis, sed kiujn oni rekonis realaj sekve de serĉadoj entreprenitaj por kontroli tiujn faktojn. Tio estas certigo, per la scienco moderna, de tiuj rakontoj pri aperoj je kiuj estas plenaj la Analoj kaj la Sanktaj Libroj de ĉiuj popoloj.

Tiam oni eltrovas ke la animo ne estas nur abstraktaĵo, parola imago, ideala koncepto sen objekta realeco; sed, kontraŭe, ke ĝi estas konkreta estaĵo, posedanta korpon formitan el materio treege subtila, kiun la spiritistoj nomis *perispirito* (el *peri*, ĉirkaŭ; *spiritus*, la spirito). Tiu korpo kopias la fizikan ŝajnon de la mortinto, kaj, kiam la cirkonstancoj estas favoraj, ĝi povas fariĝi videbla, per la ago de la forto psika kiu eksteriĝas el la mediumo. Ni estas tiam antaŭ tio kion oni nomas *materiigo*.

Tiufoje, oni povas laŭplaĉe studi la aperaĵon, paroli kun ĝi, ĝin pesi, fotografi, obteni stampojn aŭ muldaĵojn, unuvorte certiĝi per ĉiuj procedoj kiujn la scienco disponigas al ni ke oni vere estas antaŭ realaĵo nediskutebla, ne antaŭ halucino aŭ trompa artifiko.

Kiel ajn strangaj, neversimilaj tiuj faktoj povas ŝajni, ili havas por si, nun, la apogon de tre multenombraj scienculoj kiuj alvenis la konvinkon nur postkiam ili elĉerpis ĉiujn formojn kaj ĉiujn rimedojn de la neado.

William Crookes, dum tri jaroj, studis fantomon konitan sub la nomo Katie King. Li eksperimentis en sia hejmo,

kun ĉiuj antaŭzorgoj por ne esti trompata; kaj nur postkiam li vidis ĝin samtempe kiel ĝian mediumon Florence Cook kaj ofte ĝin fotografis, lia konvinko fariĝis sufiĉe fortika por ke li kuraĝu konigi la rezultaton de siaj serĉadoj, kiun oni povas resumi per unu el liaj frazoj: « Mi ne diras ke tio estas ebla, mi diras ke tio estas. » Kiel oni devis supozi, precipe antaŭ tridek jaroj, tiujn sensaciajn rakontojn akceptis ĝenerala skeptikemo. Sed la vero enhavas en si potencon nekontraŭstareblan. Estas ĝi kiu devigis la tiel eminentan fiziologiston, kiu estas S^r Ch. Richet, membro de la Medicina Akademio, skribi:

« Pro mia servutema respekto por la tradicio, mi eĉ mokis tion kion oni nomas *Spiritismo*, kaj, postkiam mi konis la mirigan raporton kiun Crookes publikigis, mi permesis min ridi je ĝi tiel verve kiel preskaŭ ĉiuj. Sed, nun, mi diras kion diris mia amiko Ochorowicz en la samaj cirkonstancoj. Mi frapas al mi la bruston kaj diras: « Sinjoro, pardonu nin! » Kiel mi povis konsenti ke la scienculo eltrovinta la taliumon kaj la radiometron, la antaŭulo de la eltrovo de la radioj Röntgen, estus lasinta sin esti trompata per artifikoj kiujn infano estus povinta facile malkovri? »

Lombroso, la fama antropologiisto, faris ankaŭ sian *mea culpa*. Postkiam li enklasigis la spiritistojn inter la frenezuloj kaj la nenormaluloj, post dekkvin jaroj, li konfesas sian eraron per la jenaj vortoj:

« Mi akiris la konvinkon ke la spiritismaj fenomenoj estas klarigeblaj, por la plej multaj, per fortoj propraj al la mediumo, kaj por la ceteraj, per la interago de estaĵoj superteraj, kiuj disponas fortojn pri kiuj la proprajoj de la radiumo povas doni analogian ideon. La solvo de tiu problemo estas unu el la plej mirindaj fariĝoj de ĉi tiu nova jarcento. »

S^r profesoro Flournoy, — parolante pri la eminenta psikologo F.W.H. Myers, kiu ankaŭ estis devigata alveni spiritismon, — eldiras la jenajn signifajn pripensojn:

«La faktoj, kiujn Myers mem rikoltis aŭ observis multope certigis al li la fundan verecon de la antikva konvinko pri la spiritoj, kies simpla eldiro kutimas okazigi krizojn epilepsiajn al la plej multe el la modernaj pensuloj, escepte tamen se sufiĉas al ili vuali sian vizaĝon aŭ levi la ŝultrojn. Post plena pripensado, mi ne partoprenas ilian senton de abomeno aŭ kompatato; la tre kompleksa kaj science prilaboradita spiritismo de Myers ne ŝajnas al mi tuj elfjetinda pro la sola motivo ke ĝi estas je la antipodoj de niaj nunaj sciencaj kutimoj.»

Spiritismo ebligas al ĉiu konvinkiĝi ke la morto ne estas absoluta neniigo, elŝutiĝo de nia personeco, salto en la maleston. Sin fundamentante sur faktoj, ĝi estas nedetru-ebla; ĉar tiuj ĉi reproduktiĝas ĉiam. Ĝi ne estas religio, ĉar ĝi havas nek pastrojn, nek kulton, nek dogmojn; ĝiaj instruadoj, ĉiam revizeblaj, pruviĝas per observado kaj eksperimentado, kaj ĝi ne pli petas helpon de la kredo ol oni tion petas en la naturaj sciencoj.

Tre dezirinde estas ke la verkoj en kiuj ĝi estas malvolvita estu tradukataj en tiun miridan lingvon Esperanto, por ke la tuta mondo pli facile ekkonu la konsolojn kiujn ĝi alportas al ĉiuj plorantaj karan mortinton, al ĉiuj maltrankvile dezirantaj scii kiu destino ilin atendas neeviteble trans la tombo.

Tia ankaŭ estas la opinio de la respektinda Alfred Russel Wallace kiu, unue materialisto konvinkita, fariĝis fervora adepto de la nova scienco.

«Spiritismo, li diras, pruvas la ekziston de formoj de materio kaj de manieroj de ekzisto kiuj estas neakcepteblaj kiam oni juĝas laŭ la vidpunkto de la pura scienco fizika. Ĝi montras al ni ke la spirito povas ekzisti sen cerbo, estante disigita de ĉiu materia substanco pesebla; ĝi detruas la antaŭjuĝon pri la neniigo de la ekzisto post la malorganizo kaj la detruo de la korpo fizika; ĝi montras per rektaj pruvoj, tiel decidigaj kiel permesas la naturo de la okazo, ke la supozitaj mortintoj estas ankoraŭ vivantaj, ke niaj

amikoj estas ofte kun ni, kvankam nevideblaj; tiel ili donas al ni la rektan evidentecon de tiu estonta vivado kiun tiom da personoj fervore deziras kaj kiu mankas al ili, kio lasas ilin vivi kaj morti en maltrankvileco.

«Ĝi estas netaksebla tiu certeco obtenita per la spiritismaj komunikoj, ĉar ĝi detruas ĉiujn dubojn pri transa ekzisto.»

Laboradi por konigi spiritismon estas do liberigi la homan spiriton de la jugo de la truditaj dogmoj, ĝin malebarasi de la teruroj pri la morto kaj malfermi al ĝi plej grande la pordojn de la senlimo. Tuj kiam la spiritismaj instruadoj estos enpenetrintaj ĉiujn konsciencojn, la Homaro regenerita irados per paŝo pli firma sur la vojo de siaj eternaj destinoj.

GABRIEL DELANNE

El la franca lingvo
tradukis J. C. C.

Inĝeniero de la Centra Lernejo,
Prezidanto de la

*Société française d'étude des
Phénomènes psychiques,*
Direktoro de la *Revue scientifique
et morale du Spiritisme.*





Esperanto kaj Spiritualismo

Je la momento kiam la grandaj religioj, kiuj alkondukis nian civilizacion al ĝia nuna stato, estis atakataj, kaj minacataj de baldaŭna ruiniĝo, estis logike vidi la problemon pri senmorteco de l'animo stariĝi de nove.

Efektive, se la plimulto de la dogmoj, pri kiuj instruis nin la diversaj religioj, estas neniigitaj, ne estas same pri la principo de l'anima ekzistado. Multaj faktoj atestas la realecon de nekonataj fortoj kaj pruvas ke ĉio en la homo ne estas nura materio.

Homoj scivolaj kaj precipe veramantaj pensis, ke tiuj faktoj meritas atenton same kiel la faktoj absolute materiaj. Ili komencis kuraĝe labori, kaj ilia ekzemplo vekis la scivolemecon de multegaj aliaj serĉemuloj, kiuj nun senĉese laboras en ĉiuj partoj de l'mondo por solvi la grandan problemon.

Iliaj laboroj jam bone efikis, altrudante al la mondo la hipnotecon, kun ĝia aro da fenomenoj pli mirigaj unuj ol la aliaj, la telepation, ĝenerale akceptitan hodiaŭ; sed kiom da demandoj restas nesolvitaj! La memleviĝo de la korpoj ekzemple ankoraŭ nun tre diskutata, spite la rimarkindaj laboroj de kolonelo de Rochas.

La pli granda parto el tiuj faktoj povas tamen esti observataj, kun ĉiuj dezireblaj garantioj, ĉar ili estas elmontroj de sama forto pri kiu S^{ro} de Rochas diras en sia ĉefverko « *Les Frontières de la science* » (*La Landlimoj de la Scienco*):

« Tio kio tute dependas de la pozitiva scienco, tio kio estas nur pligrandiĝo de l'konaj jam akiritaj pri naturaj fortoj, estas la observado de la propraj karakteroj de tiu

« psika forto, kaj ĝia difino, ĝia memstado por tiel diri, per la difino de ĝiaj agoj kaj reagoj kiuj okazas inter ĝi kaj la aliaj jam konataj fortoj.

« Multaj verkoj estas jam publikigitaj en tiu senco. Ili estas preskaŭ nekonataj en Francujo; ĉu ĉar oni verkis ilin en fremdaj lingvoj, ĉu ĉar ili estis enmetitaj en memorskriboj eldonitaj po malmulte da ekzempleroj kaj traktas aferojn malfacile kompreneblajn de nescienculoj; sed la observadoj fariĝis hodiaŭ sufiĉe precizaj, sufiĉe akordiĝantaj por ke oni povu jam pensi ke estas starigitaj la fonoj de nova scienco al kiu mankas nur por difinitive progresi la helpo de multaj inteligentaj homoj, kiuj jam ne timas uzi la severajn metodojn de l'moderna eksperimentado por observi faktojn el kiuj la publika opinio ilin forlogis antaŭe. »


Rezultas de tio ke, ankaŭ tie ĉi, la diverseco de la lingvoj alportis barojn al la disvolviĝo de l'progreso.

Esperanto venas do ĝustatempe por ebenigi la vojon en tiu parto de l'Scienco. Dank' al ĝi, la verkoj de tiuj serĉemuloj povos esti konataj de la tuta mondo; ĉiu el tiuj ĉi ekonomos sufiĉe frue la rezultatojn de siaj samcelantoj; estos eble al ili interakordiĝi por fruktiga laboro, kaj batali kontraŭ la premeanta materialismo, starigante kontraŭ ĝi faktojn science pravigitajn.

Estus do necese, ke ĉiuj esperantistoj (kaj multaj ili estas) kiuj interesiĝas pri tiuj emociigaj problemoj kungrupiĝu por formi la unuan areton, kaj baldaŭ ni vidus kun ĝojo disvolviĝi sur la tuta mondo potence kaj agantan asocion, por kies anoj ne estus sensenca la bela vorto Frateco.

LE CORNEC.

Esperante verkita
de la aŭtoro.





GITARKUNSIDO

Priskribita de la prezidanto de la spiritista societo "B. F.",

KRISTIANO

Norvegujo.

Estis en februaro 1891, mia rondo konsistis tiam el 8 anoj: 5 sinjorinoj kaj 3 sinjoroj. Ĉar al mi skribe estis sciigita, ke ni ricevos difinitajn fizikajn fenomenojn, ni ordigis nin tiamaniere:

En longmuro de la ĉambro estis tre profunda pordkadro antaŭ kiu ni pendigis pordkurtenon, kiu plene kovris la pordmalfermaĵon.

En la kabineto tiamaniere farita oni metis seĝon kun loko por la ĉefmediumino. Gitaro estis metata sur la genuojn de la ĉefmediumino kaj la rondanoj sidiĝis sur seĝojn; ili estis ordigataj duonrondforme antaŭ la kabineto.

La anoj faris ĉenon, t. e. tenis siajn manojn unu al la alia, maniero uzata en mallumkunsidoj parte por forigi suspekton pri trompo kaj parte por pliiĝi la forton de biomagnetismo, kiu estas necesa por atingi la spiritismajn fenomenojn.

La ĉefmediumino sekve estis plene ĉirkaŭita, kaj ne povis forlasi la kabineton sen risko esti malkaŝita.

La rulkurtenoj antaŭ la fenestro poste estis malsuprentiritaj, kaj ni sidis en mallumo, kiu ne eĉ permesis al ni vidi la manumojn de niaj manoj.

En la kunsido, kiun mi nun estas priskribonta, ĉeestis ankaŭ sveda sinjoro S^{ro} Majoro O. A. Busch, el Stokholmo, ekster la kutimaj rondanoj, kaj estis mia gasto ĉe la super-

nomita okazo. Du kantoj estis kantataj kaj poste ni ekaŭdis, ke la gitaro estis movata.

Ni klare rimarkis, ke ĝi ŝvebis ĉirkaŭe en la ĉambro, super niaj kapoj. Mi demandis ĉu povus esti ludote sur la gitaro, en la sama momento estis aŭdataj tri fortaj akordoj el la plej malproksima loko de la ĉambro.

Mi prezentis diversajn demandojn kiuj parte estis respondataj per unu akordo, kiu, laŭ nia spiritista praktiko signifas "ne" kaj parte per tri, identaj al "jes". Mi demandis ĉu la eksperimentanto povas frapi la plafonon per la gitarmanenilo? tuj ni aŭdis diversajn frapsonojn kiuj estis tiel fortaj, ke sinjorino loĝanta en la ĉambro supre, aŭdis ilin, kaj poste esploris kion la frapoj signifas. Mi petis ke la gitaro estu kuŝiganta sur la kapon de la Sveda S^{ro}, kio ankaŭ tuj okazis.

Mi elparolis deziron ke la akordoj estu frapataj, dum la gitaro havis tian pozicion kaj en sama momento estis aŭdata serio da akordoj.

La fenomeno estis tre impresiga entute, tre mistera, sed restis ia manko pro tio, ke nia plej grava sento, la vido, estis forigita ĉe la percepto de la fenomeno; ĉe la fino de la kunsido la gitaro malleviĝis suben en la duonrondon, kaj, kiam la lampo ekbruliĝis, estis trovata en sia originala pozicio sur la genuoj de la ĉefmediumino.

Mi pripensadis dum la sekvintaj tagoj eblecon de ruzo ĉe la rondanoj, sed estis necble trovi iam tenpunkton por tia suspekto. Atingi la plafonon kun la gitarmanenilo, etendante la gitaron supren, ne estis ebla por iu el la partoprenantaj rondanoj sen leviĝo el sia seĝo, kio kompreneblu estus eltrovita de la apudsidantoj. Tamen oni povis supozi ke tie ĉi prezentigis tielnomata kolektiva aŭdhalucinaĵo, sed tiaj, sur patologiaj kaj hipnotaj statoj fonditaj hipotezoj, neniam plaĉas al mi, ĉar ili ŝajnas al mi tro artefaritaj kaj neverŝajnaj. En la realeco tio estas por la scienculoj nenio alia ol "La pajlo kiel savtabulego".

Mi tial trovis, ke estas plej saĝe trankviliĝi, alpreni

atendantan sintenadon, kaj esperi ke la pruvo por la realeco de la fenomeno venos al mi ĉe pli malfrua okazo, espero kiu ankaŭ ne estis malpravigata.

Inter la rondanoj estis sinjoro kiu kelkajn fojojn petis, ke lia edzino povu akiri allason por partopreni la kunsidojn. Ĉar tiu S^{mo} neniam partoprenis iun kunsidon kaj entute ŝajnis al mi malmulte kapabla por sidi en mallumkunsido, mi en la komenco estis ne volema por plenumi la deziron de ŝia edzo, sed li ne trankviliĝis je mia rifuzo; « mi raportis » li diris « al mia edzino pri la fenomenoj kiujn mi ĉeestis kaj ŝi ankaŭ legis iom da literaturo, tiel ke ŝi tute ne estas nepreparita ».

Mi skribe konsultis la kontrolanton de la kunsido (la spiritan gvidanton) kaj estis dirata al mi ke mi tute bone donu al la S^{mo} allason, sed ke mi en tia okazo devus utiluzi ruĝan lumigon.

Nenia aranĝo estis pli dezirinda ol tiu ĉi, ĉar mi per tio vidis eblecon por solvi la problemon t. e. havi la konfirmon de la realeco de la fenomeno, kaj mi tial tuj donis mian permeson al la koncernatina partopreni en la kunsido.

Mi posedis fotografan lampon kun karminkolora vitro. Plenumante, tiu produktis tiel fortan lumon, ke ĉiuj objektoj en la ĉambro klare estis videblaj. Tiu ĉi lampo estis uzata.

La fremda S^{mo} estis sidigata ekster la duonrondo, la gitaron oni metis sur la genuojn de la ĉefmediumino kaj la rondo cetere estis ordigata en sama maniero kiel antaŭe. La nombro de la rondanoj ankaŭ estis la sama, ĉar mia sveda gasto forvojaĝis.

Kvankam ni ĉiuj estis preparitaj por tio kio nun okazos, ellasis ni ĝojekkrion, kiam ni vidis la gitaron ekaperi plej supre en la pordokurtena malfermaĵo, svingiĝi en la aero, kaj, sen iu ajn subteno aŭ videbla influo, ŝvebi tra la ĉambro, jen rekte super niaj kapoj kaj jen sub la plafono. Mi rediris miajn demandojn kaj admonojn de la antaŭa kunsido.

La akordoj sur la gitaro estis frapataj per nevideblaj manoj kaj mi kaj vidis kaj aŭdis, ke la gitarmantenilo frapas la gipsplafonon.

La eraro estis tie ĉi tute neebla. Momente la gitaro haltis, ĝi estis vidata alpreni oblikvan pozicion kaj malrapide malleviĝi en rekta linio kun la kapo de la nova partoprenantino. Kiam la sinjorino ekvidis tion, ŝi ekkriegis kaj la gitaro falis peze sur la plankon.

Tiu skuado, kiu la ekkriego kaŭzis estis sufiĉa por disŝiri la delikatan interligon, kiu estis la kondiĉo por la ago de la nevidebla forto sur la materion.

Mi estis atendita trovi la gitaron frakasita, kaj disrompita, sed bonŝance ĝi nur ricevis krevafeton en la superaĵo, alie ĝi estis nedifektita.


Nature pro tia okazo la kunsido estis finita, sed tio, en kio ĝi rezultis estis tiel grava, ke tio plifortigis la pozicion de la rondanoj je la spiritisma vereco.

Kiel ankaŭ povis dubo plie esti ebla? Tromphipotezo ja ĉi tie ne povis esti konsiderata, kaj la halucinacihipotezo! — Ĉu halucinacio povas bati krevafeton en gitaron? Kaj la krevafeton la gitaro havas ĝis ĉi tiu tago.

Tio, kion oni en ĉi tiu kunsido vidis kaj aŭdis sekve estis absoluta fakto, kaj faktojn eĉ la plej « sciencaj » hipotezoj ne povas venki.

P. M. PETERSEN,
Prezidanto de la « B. F. »
Kristiano.

Tradukis Brochmann Sletterød.





Spiritistaj Memoroj

Fina parto de studo pri

“la sciencaj pruvoj de la anima postvivo „

Mi tre deziris vidi materiigojn, kaj estas la afabla kolonelo Devolet, tre bone konanta ĉion okazantan en la pariza spiritista mondo, kiu havigis al mi tian eblecon, konigante al mi Sinjorinon B..., ĉe kiu oni obtenis kelkafoje, laŭ diraĵo, aperojn de manoj en mallumo. S^{mo} B. konsentis ke mi ĉeestu ŝiajn mardajn kunsidojn ĉiufoje kiam mi volus, kaj mi larĝe profitis la permeson. Post kelka tempo, anstataŭ manojn, ni vidis buston kompletan kaj luman formigantan flanke de la mediumo, dum tiu ĉi estis lokita, sidante sur seĝo, meze de rondo konsistanta el deko da personoj sin tenantaj reciproke per la mano.

Iom post iom produktiĝis novaj formoj pli vivaj, sed kiuj lumigante nur sian vizaĝon, estis videblaj nur por la personoj antaŭ kiuj ili sin prezentis.

Kelkaj kutimuloj, celante kiel eble plej baldaŭ obteni fenomenojn pli perfektajn en lumo, proponis ke oni havu ĉiusemajne rezervitan kunsidon, por la nuraj membroj de studa grupo, kiun oni petis min prezidi. Kaj tio efektiviĝis (de oktobro 1883 ĝis junio 1884). Tiel *mi povis esti ĉeestanto de almenaŭ cento da materiigoj*, ĉu en mallumo, ĉu en duonlumo.

Kelkaj el la mallumaj kunsidoj havis por mi grandan intereson pro la du jenaj motivoj. Ili ebligis al mi konstati *ke materiigitaj formoj elsendas lumon*, kaj ke ili povas pliiĝi aŭ malpliiĝi sian radiadon; ke ili ĝin pliiĝas kiam ili

troviĝas antaŭ personoj de kiuj ili volas esti klare vidataj; kaj ke, por pli bone lumigi sian vizaĝon, sufiĉas ke ili portu siajn manojn je la nivelon de la tempioj, ilin aranĝante tiamaniere ke ili formu kvazaŭan volbon malfermitan je la nivelo de la frunto, kaj komunikaute al siaj fingroj tre delikatajn movojn de flekso kaj de etendo. Plie, afero de kiu mi estis kiel eble plej forte impresata, mi tie vidis tion kion mi nomas la naskiĝo de unu el tiuj vivaj formoj elirantan subite el nuba blanka maso produktiĝinta apud la mediumo.

En dekunu kunsidoj duonlumaj, inter dudek tri, kies mi konservis protokolojn kiujn mi tuj redaktis reveninte hejmen, la mediumino estis vidata kiel eble plej nete samtempe kiel la individuoj materiigitaj. En la kunsido de la 23^a de novembro 1883, unu el tiuj individuoj kondukis, unu post la alia, tenante ilin per la mano, ĉiujn ĉeestantojn antaŭ la subjektinon entranciĝintan. Ĉiuj konstatis ke ŝi estas alligita, kiel je la komenco de la kunsido, sur sia fiksa apogseĝo, per solidaj ligiloj kies tuberoj estas plumbsigeligitaj. Kelkaj inter ni, post kiam ili bone vidis ŝin, povis ŝin tuŝi, kun konsento de nia transa kondukanto.

En kelkaj el tiuj kunsidoj, membroj de la grupo rekonis parencojn. S^{mo} Dieu perfekte rekonis unu el siaj nevinoj, kiu venis propramove sin meti antaŭ ŝin, esprimante per siaj gestoj kiom ŝi estas feliĉa sukcesinte iĝi videbla kaj esti rekonata. Same okazis por S^{mo} Noeggerath. La apero, kiu diris sin ŝia nevino, sciigis ŝin, per mallaŭta vorto ĉe la orelo, kiu estis la vera kaŭzo de sia morto, kaŭzo kiu ĉiam estis estinta nesciata de ŝia familio. Informoj kiujn poste ricevis S^{mo} Noeggerath konfirmis tiun postmortan rivelon.

En malluma kunsido kiu okazis ĉe mi mem, mi vidis pasi antaŭ mi, kaj unu el miaj flinoj same vidis, la formon de mia patrino, mortinta de multaj jaroj, montrantan vizaĝon bone lumigitan per ŝia propra lumo kaj kapkovritan per fulardo, simila al tiuj kiujn portis ankoraŭ hejme la plej riĉetaj sudfrancaj virinoj, antaŭ trideko da jaroj.

Sed oni scias ke la nura materiigo, malgraŭ la fizika simileco kiun ĝi donas, ne estas konsiderata de ĉiuj

spiritistoj spertaj kiel sufiĉa pruvo de identeco. Tial mi estis feliĉa, post la ĉesigo de la kunsidoj pri kiuj mi ĵus parolis, ke mi povis kompletigi mian instruadon pri transcenda psikologio per mia ĉeesto je multenombraj kaj tre belaj kunsidoj de enkarniĝo kaj de tiptologio (parolanta tablo), kaj ke, por tiuj ĉi, mi trovis bonegan mediumon en la persono de junulino, membro de mia familio, kiu estis ankaŭ duonmeĥanika skribmediumo. Dank' al tiuj cirkonstancoj, estis al mi ebligite ricevi, ĝis la jaro 1897 unu aŭ du komunikaĵojn ĉiusemajne, tiamaniere ke mi kolektis pli ol okcent, el kiuj la plej multaj estas elokventaj pledadoj por la *reenkarniĝo de la animoj*, kaj inter kiuj multaj donis al mi nediskuteblajn pruvojn de la identeco de spiritoj kiujn mi estis koninta antaŭ ilia tera morto.

La aŭtoroj de tiuj komunikaĵoj certigas la realecon kaj la necescon de la vivadoj intersekvaj. Ili klarigas jene tiun necescon: Ĉiu homo portas en si bezonon de progreso kiun la plej longa (tera) ekzistado ne povas kontentigi. Bezono do estas ke li (1) povu, malgraŭ la morto kiu redonas lian pensantan estaĵon al la libera spacvivado, daŭrigi sian altiĝantan iradon al la idealo de perfekteco kiu lin altiras. Se li estus malhelpata je tio, la kreinto estus doninta al li la amon al bono, vero kaj belo, laŭ la plej alta esenco kiun ĝi enhavas, kaj samtempe estus lin seniginta de la rimedo por ilin posedi. Li estus do trompinta sian kreitaĵon, kio estas malkunigebla kun nia ideo pri Dio, kiun ni figuras al ni kiel la tipon de ĉiuj perfektecoj, de la senlima amo kaj de la absoluta justeco. Dio, ne povante trompi la homon, donis al li la multecon de la ekzistadoj por ke li efektivigu libere sian destinton, kiu estas progresi senĉese. Ĉiu korpa ekzistado, ĉiu vivado kelkatempa estas, efektive, fandilo kie la

(1) Mi tradukas per « li » pro la kutimo; sed eble estus preferinde traduki per « ĝi »; ĉar ĉi tie « homo » estas homa estaĵo, ne pli viro ol virino. — (Noto de la tradukinto).

spirito puriĝas, penado kie liaj kapabloj pligrandiĝas, ŝtupeto kiun li devas transpaŝi sur la granda ŝtupetaro kiu kondukas lin al la aspirata celo, la perfekteco.

La spirito, reenkarniĝante, perdas la memoron de sia estinto, sed la morto igas lin ĝin retrovi, same kiel somnambulo revenante en sian normalan staton forgesas kion li faris dum sia dormado kaj ĝin denove memoras tiuj kiam li estas redormanta. Estas tio kio igas la individuaĵojn liberiĝintajn de sia tera korpo diri ke la morto estas renaskiĝo aŭ transpaso de mallumo al lumo. La spirito elkarniĝinta vidas klare, laŭ ilia dirado, la penetraĵon de la agoj kiujn li plenumis dum siaj antaŭaj ekzistadoj, kaj pro tio li estas feliĉa aŭ suferas, laŭ tio se li agis bone aŭ malbone uzante sian liberan volon. Tiu vido lin pretigas al la decidoj kiujn li devos alpreni kiam venos por li la momento reenkarniĝi, ĉar lia reveno en la korpan vivon obligos al li ripari la kulpojn antaŭe faritajn aŭ simple progresi je plua paŝo sur la vojo de sia perfekteco.


Do, ni mem preparas nian estontan ekzistadon, kiu estos sekvo de la antaŭa, kiel ni mem preparis nian nunan vivadon.

Pro la fakto de la multeco da ekzistadoj, la vivantaroj kiuj intersekvos unu la alian konsistas el la samaj spiritaj individuaĵoj, kiuj renaskiĝas je diversaj epokoj kaj profitas la pliboniĝojn kiujn ili mem preparis, la sperton kiun ili akiris en la estinto.

Kian kuraĝon, kian animforton tiu teorio, enpenetrinte la spiriton de ĉiuj, estus kapabla vastigi!

DOKTORO L. TH. CHAZARAIN.

El la franca lingvo
tradukis J. C. C.





Estas necese ilin kutimigi.

Unu el la ĉefaj kaŭzoj, eble la sola, de la malamikeco kiu ekzistas inter la homoj, ne estas alia ol la diseco, kiun, depost la plej antikvaj epokoj, oni faris laŭ la diversaj rangoj de la societo.

La fiereco kaj la egoismo fosis inter ili profundegan valegon, levigante netrapaseblan barafon, kiujn valegon kaj barafon fortigas la diversaj centroj kie la infanaro ricevas la unuan edukadon.

Se ĉiuj infanoj estas edukataj inter siaj samranganoj, la horizonto de la homa ekzisto limiĝas nure al tiuj kiuj apartenas al tiu sama rango. Ili ne konas la malriĉulon, la laboriston, nek la popolon, tiun grandan maron de siaj samlandanoj kaj per tiu fakto ili ne konas iliajn mizerojn, iliajn mankojn, ilian malsaton kaj iliajn lacadojn kaj ĉar ili neniam ion « bezonis » ili ne povas tial taksi la valoron de la mono, ili ne scias kiom valoras la pano ĉar tiuj eroj ne lerniĝas en la historio, en la filozofio nek en la salonoj kaj egoismo igas ilin malestimi; ili daŭrigas ĉiam ne konante tiujn faktojn, ĉar nur estas eble ekkoni kaj lerni ilin ĉe la laboro de la koloniisto, ĉe la loĝejo de malriĉulo aŭ fiŝkaptisto kaj en la kavernoj kie rifuĝas la plej grandaj necesuloj.

Edukitaĵoj tiamaniere en tiu medio, ili sin kredas de supera raso kaj ĝenerale rigardas kun malestimo ĉiujn, kiuj — malfeliĉe — ne apartenas al ilia klaso, al ilia rango aŭ almenaŭ al ilia alta stato.

Kaj kun la malriĉuloj, kio okazas? Similaĵo..

Malzorge kaj apenaŭ instruitaj kaj edukitaĵoj ankaŭ inter samranganoj ili tial ne konas la mizerojn kiuj estas kaŝitaj sub la beleco de la salonoj, la saton kaj la enuon de la vivo, kiujn kaŭzas la mallaboremeco kaj la moleco de la riĉuloj, la

malmulte da estimo, kiun ili havas por ilia komforto, ĉar ili ĝin uzadis depost kiam ili estis infanoj, eĉ ne pripensante ke por ili estas vanaj vortoj, kaj malplenaj de senco, la ŝparemeco, kiu ne estas avareco, kaj la singardemo kiu ne estas ruzo. Tial mem ili ne vidas ke tiu enuo, tiu tedo por la vivo kaj tiu hipokondrio kondukas la riĉulojn al la serĉo de plezuroj kaj frenezioj en kiujn ili ensabliĝas, plimalaltiĝas, kaj veneniĝas, malfortigante per ĉiuspecaj laboroj sian fizikan kapablecon, disjetante kun vera malŝparemo siajn fortojn fizikajn, kaj, kio estas pli grava, siajn spiritajn.

Tial ke ĉi tion la malriĉuloj ne scias, ĉar ili grandiĝis tute disigitaj kaj estis edukataj aparte de la riĉuloj, de tie venas ke ili ĵaluzas la rangon kaj la « feliĉecon » kiujn havas tiuj kiujn oni nomas riĉuloj kaj ĉar ili ne povas kompreni tion jen tial en iliaj animoj naskiĝas la malŝato kaj la malamo.

Se la riĉulo rememoriĝus ke Jesuo naskiĝis malriĉa kaj estis laboristo kaj se la malriĉulo pensus al la vortoj kiujn al tiuj ĉi elparolis nia Majstro, estas certe ke tiu malamo, tiu supereco, kiun unu sur la alia kredas havi, tiu malŝato foriĝus. Kaj se al tio oni aldonus komunan solvon, estas certe ankaŭ ke malaperus entute tiuj malbonaĵoj kiuj tiom haltigas la animojn sur ilia revivigada kaj progresada vojo.

Al tiu solvo emas la sociologio, la modernaj regadsistemoj, la moralistoj, la pensuloj kaj ĉiuj kiuj estas la unuaj kiam la civilizadon kaj la progresadon io koncernas kaj la amon por la homaro.

Ni kutimigu la infanojn de ĉiuj ke ili ne malestimu la malriĉulojn kaj ankaŭ ni zorgu ke ili estu edukataj kune en la infaneco por ke ĉiuj konu la mankadojn unu tiujn de la alia, kio igos ilin emaj por helpi, kun amo, unu la alian.

D. JUAN FIGUEREDO.

Tradukis A. S.

Linares.

Hispanujo.

Pri la homa Destino kaj Dio

Komandanto Darget (*elparolu Darĝe*), kies originalaj laboroj pri la radioj vivaj (kiujn li nomas radioj V) estas tre konataj, bonvolis verki por ni filozofian artikolon. Ni bedaŭras nur ke, pro tro granda modesteco, li ne aldonis paĝon same interesan pri sia speciala eksperimentado.

Jen per kiuj unuaj vortoj li komunikis al ni sian tekston :
« Mi sendas al vi la artikolon kiun vi bonvolis peti de mi por Esperanto. Se vi enpresigos ĝin, mi sentos min tre honorata... ».

Magnetismo kondukas al spiritismo, spiritismo kondukas al la senmorta animo, kaj la senmorta animo kondukas al Dio.

Sed kiom malproksime estas, de la malgranda Dio, konceptita de ĉiuj religioj kiuj multegiĝas sur la supraĵo de nia malgranda tero, al la granda Dio nekonata kaj nekonebla, kiu igas turni, neniam interfrapiĝante, en la nesondebla senlimo, miliardojn da universo.

Oni povas certigi kiel aksiomon ke estas malplimulte da intelekta distanco inter ostro kaj homo ol inter homo kaj Dio ; tio estas ke ostro pli rajtas havi komprenon de la homaj kapabloj ol homo rajtas havi komprenon de la kapabloj de Dio. Homo, kun sia destino estonta, tra la jarcentoj kiujn li trairos eterne, estas simila al aritmetika frakcio perioda, kiu ĉiam alproksimiĝas al la celata unuo, neniam povante ĝin trafi. Jesuo-Kristo diris ke « ni ĉiuj estas Dioj » (1). Li volis diri, per tiuj vortoj, ke ĉiu el ni estas destinata, — kiam la grandeco de lia evolucio tion permesos, post sennombraj intersekvaj vivadoj, ĉu sur nia tero, ĉu sur aliaj planedoj, ĉu en la spaco, post miliardoj da jarcentoj,

(1)... Jesuo respondis al ili : « Ĉu ne estas skribite en via leĝo : *Mi diris : Vi estas Dioj* ».

(S. Johano ; ĉap. X, v. 34).

— turnigi planedon sur ĝia akso, regi mondon, igi ĝin evolucii ĝis ĝia fino, por preni ankoraŭ la regadon de mondo pli grandega, kaj tiel plu, iom post iom, altiĝante ĉiam.

La Dio devena, la Eterno, la Kreanto, la Nekreito, havos senĉese novajn planedojn, novajn sunojn, novajn sunajn nebulozojn por doni al ni, ĉar la spaco senlima daŭrigas ĉiaman plivastiĝon ; nenia muro estas por ĝin haltigi.

El la franca lingvo
tradukis J. C. C.

KOMANDANTO DARGET.

Kelkaj vortoj pri Teologio

Ĉu oni povas studi tion kio rilatas al la nemorteco de la animo ne priokupiĝante pri la ekzisto de Dio ? Vere ambaŭ ideoj estas ligitaj tro intime per la tradicio. Tamen je la vidpunkto de la pura racio, ĉiu demando povas estis konsiderata laŭ maniero tute sendependa de la alia, kaj precipe, por la studo de la teologio, oni povas preterlasi ĉiun decidon pri la problemo de la nemorteco de la animo, kaj starigi tiamaniere la teologiajn ideojn sendepende de la opinioj plej diversaj koncerne la postmortan vivadon.

Estas tio kion ni intencas fari en la linioj kiuj sekvas, juĝante ke la penado kiun la spirito faras par atingi al la vero estas tiom pli energia kaj tiom pli fruktodona ke ĝi sin sentas pli libera kaj malembarasata de ĉiu koncepto « a priori ».

Ni ne komencos vekigante la problemon de la ekzisto de Dio ; male, mi sekvos metodon treege pli pozitivan kaj kiu ne lasos en la cerbo de la leganto lokon por iu ajn dubo.

La vorto Dio ekzistas de longa tempo en la lingvoj de la homoj. Tiu vorto certe respondis al unu aŭ multaj ideoj t. e. al konceptoj naskitaj de la revo, de la imago, de la fantazio, kaj kiuj tamen povus respondi al io reala.

En la aro de realaĵoj kiujn la homo povas koni ni ekzamenis kaj serĉis kiuj el ili povas esti identigataj kun la ideo esprimata per la vorto Dio.

Tiu ideo ĉion eniĝas kaj estas retrovebla en ĉiuj aspektoj de la penso.

Por igi niajn serĉojn kompletaj ni dividis metode ĉion kio povas esti objekto de kono por homa estaĵo kaj ni tranĉis tiun idearon en du distinktajn partojn. La unua, la Universo; la dua, la homa animo; tio estas unuflanke la ekstera mondo kaj aliflanke la interna mondo de la ideoj kaj sentoj. Ĉiun el ambaŭ grandaj sekcioj ni dividis plie laŭ la triobla vidpunkto de la formoj de la tempo, kaj nome por la unua fako ni tiel eltrovis ke la universalaj realaĵoj kiuj korespondas al la ideo « Dio » estas rilate al la estinto la ideo de kaŭzo, rilate al la estanto la ideo de esto, rilate al la estonto la ideo de leĝo. Estas al la unua el tiuj aspektoj ke ni dediĉas tiun ĉi artikolon.

Tre profunda studo de la naturo ebligas nin ekvidi ke tuta serio de fenomenoj, ŝajne malsamaj, dependas de la ago de unu sola kaŭzo.

Tiel la libera falo de korpo en la aero, la ruliĝado de globeto sur klina plato, la akvokuro de riverego, la ŝovado de tertavolo dekliva moligita de la pluvo, estas tiom da diversaj ekzemploj de la efiko okazigata de la pezo.

En alia sfero, ĉiuj movadoj, plej diversaj, de la astroj estas kaŭzataj de la agado de unu sola kaŭzo, la gravitado. Sed kiam ni pli profunde antaŭendaŭrigas la analizon, ni vidas la ideon de pezo kaj tiun de gravitado unuiĝi en la koncepton pli altan kaj pli larĝan de « universala altirado ».

En la nuna momento la konoj posedataj de la homaro ne al ĝi permesas identigi tiun kaŭzon de la « universala altirado » kun tiu de aliaj fenomenoj dependantaj ekzemple de la ĥemio, de la biologio aŭ de la psikologio, sed ĉu ne estas eble akcepti ke laŭmezure ke la homaj konoj malvolviĝos, ni sukcesos plimalmultigi la nombron de la diversaj kaŭzoj

kiuj ŝajnas okazigi la aron de la ekzistantaj manifestaĵoj. Se do ni akceptas ke per la progresado de niaj konoj la plisimpligo pri kiu ni ĵus parolis povas kaj devas okazi, ĉu ni ne devas konkludi ke alvenonte, per imagoj, al la tuta kono de la Universo, ni eltrovos ke ĉiuj ajn kaŭzoj plej diversaj, ŝajne malproksimaj, ke ĉiuj, mi ripetas, reunuiĝas en unu solan kaj saman ?

La ekzisto de tia sola kaŭzo de ĉiuj realaĵoj, kiujn ni povas koni ne estas do pruvita. Ĝi ne estas elmontrebla, ĉar oni devus esti alveninta al la kompleta scienco, al la tuta scienco, por povi fari tiun pruvon, sed ĝi estas akceptebla, ĝi estas verŝajna. Ĝi estas de tia naturo ke ŝajnas ke ĉiu sincera homo devas konsenti ke verŝajne ĝi ekzistas. Nu, ni diras ke tiu nura kaŭzo, kiun ni ne konas sed kiun ni antaŭsentas estas identa al la ideo esprimata per la vorto Dio.

Por fari de tio la pruvon, sufiĉos al ni vidigi ke la titoloj Kreanto kaj Ĉio-Potenca, kiuj estas nekontesteble la ordinaraĵoj de la diaĵo, konvenas perfekte al la ideo de ununura kaŭzo.

Ni ne bezonas restadi longan tempon por komprenigi la rilaton kiu ekzistas inter tiu ideo de ununura kaŭzo kaj tiu de kreado, uzata laŭ ĝenerala, eterna senco, ne momenta, tempa: tio, kio kaŭzas estas evidente tio kio produktas, kio kreas.

Sed ni ankaŭ diris ke la ununura kaŭzo devas esti ĉio-potenca. Nu la ideo de Ĉio-Poveco certe nur konvenas al principo kiu povas esti similigata kun la volo. Sed la volo estas precize unu el la formoj, kiujn prenas la nura kaŭzo, la formo kiun ni plej bone konas, ĉar ĝi estas tiu kiu okazigas niajn proprajn agojn en la interno de nia konscienco.

La ununura kaŭzo do devas enhavi la fakon « volado » same kiel la universala altiro enhavas la fakon « pezado ». La ideo de potenco do povas kuniĝi kun la principo de ununura kaŭzo. La limigo de potenco nur estas efektivebla

per kaŭzo mala aŭ malsama. Kiu kaŭzo povus kontraŭstari la ununuran kaŭzon kiu enhavas ĉiujn kaŭzojn ?

Neniu, do la ununura kaŭzo estas necese ĉio-potenca.

Ĉu tiu klarigo de la ideo pri Dio, donas la solvon de la problemo pri la suferado ?

Se la universo estas gvidata de kaŭzo identa al la principo de nia volo, kiel okazas ke tiu ĉi povas renkonti, sur sia vojo, baron, malhelpon, doloron ?

En realeco du aspektoj de sama kaŭzo povas esti kontraŭbatalantaj unu la alian, kiel ekzemple la pezado kaj la gravitado en la alternado de la tajdoj.

La suferado estas averto kiu al ni montras tion, kion ni devas eviti por bone vivi. La suferado al ni lernas do direkti nin, kaj ni povas kompreni ke la kaŭzo kiu ĝin okazigas ne havas naturon malamikan al nia volado mem.

Estas tamen tiu ekzisto de la malbono kiu tiom profunde malkvietigis la spiriton de la primitivaj teologiistoj kaj kondukis ilin al la opinio konsideri la universon kiel la batalkampon de du kontraŭstarantaj kaŭzoj, unu bona, alia malbona, kiel Ormuzdo kaj Ahrimano aŭ kiel Dio kaj Satano en la infaneca teologio de la katolika religio.

La identigo de Dio kun la ununura kaŭzo lumigas ankaŭ iajn realaĵojn de la socia vivo. Ni diris ke la nura kaŭzo enhavas la fakon Volado en ŝi, sed ĝi devas esti konsekvence de tia naturo ke ĝi unuigu ĉiujn voladojn. Tio faras ke du voladoj kiuj akordiĝas alproksimiĝos al Dio kaj ke la obeado al komuna celo, al idealo, grupigante ĉirkaŭ ĝia standardo aron pli kaj pli multenombrian de samideanoj, estas certa gvidilo direktanta la paŝojn de la homo al la perfekteco, submetante la individuan volon al la volado kolektiva de la grupo al kiu li apartenas, figuro jam pli pura kaj jam pli proksima al la dia kaŭzo.

Konsiderate en sia agado kiel kondukanto de la grandaj historiaj fenomenoj, la ununura kaŭzo aperas sub la nomo « Providenco ». Estus tamen mallogike diferencigi, inter la okazintaĵoj, tiujn kiuj havus karakteron providencan de

tiuj aliaj al kiuj tiu eco estus rifuzata. Se tiu diferencigo produktiĝis en la ĉiutaga lingvo, estas pliĝustadire tial ke kelkaj okazantaĵoj ŝajnas direktataj de iu inteligentaĵo sendependa de la homa estaĵo, sed analoga, laŭ principo, al la esenco de la homo... sed tio nin enirigas en la kampon de la spiritismo, de la ebla influo de estaĵoj inteligentaj kaj nevideblaj en la diversaj fenomenoj de la homa vivado kaj tiamaniere nin forigas de la ĝustedirita teologio.

Alia vidpunkto, pli alta, nin rekondukos al ĝi. Ĉu la malvolviĝo de la homara vivo, la historio en sia plej alta senco kaj plej vasta, ne sekvas planon kompreneblan, marŝadon progresantan, kiujn ni povas koncepti kaj kiuj superas alte ĉiujn plej ŝajne kontraŭajn eventualaĵojn, ĉiujn penadojn, klopodojn, entuziasmojn kaj senkuraĝiĝojn de la homa estaĵo ?

Tiu plano de la historio estas la plej klara kaj la plej hela esprimo de la dia volado, ĝi estas ankaŭ la figuro plej nediskutebla de la ununura kaŭzo, kies ni ĵus provis komprenigi samtempe la ekziston, la ecojn, kaj la funkciadon en la Universo.

Chevalier LE CLÉMENT DE ST MARCO.
Prezidanto de la Belga Federacio Spiritista.

tradukis A. S.

Anvers.



Kelkaj notoj pri Magnetismo

Ĝenerale oni kredas ke Magnetismo estas eltrovaĵo tute moderna depost kiam lertaj ĵonglistoj ekzercis en ĝia nomo.

Ni lernigu al niaj legantoj tamen ke Magnetismo estas natura propraĵo de la homo kaj ke la aplikado de tiu kapablo estis tre honorata en la antikvaj tempoj.

La magio, sola scienco konita ĉe la tempoj de la Faraonoj kaj kulturita ĝis kaj post Kristo, nur malkovris siajn famajn misterojn per la uzado de tiu nekonata kapablo. La Magio, ĝenerala esprimo, restis enŝlosita ĉe la sekretscienculoj de Tibetujo nur, dum en la Oriento ĝi malaperis post kiam la apostoloj, imitantoj de Jesuo estis forlasintaj ĝian miraklan uzadon por la tujeco de la resaniĝoj.

Tiu terapeŭtika rimedo ekzistis en ĉiuj tempoj. Mi povas citi Homeron kiu skribis: « kelkaj homoj havas la manon medicina ». Post la apostoloj la magnetismo, sub la nomo de Magio estis ankoraŭ praktikata de la Nazareanoj (la daŭrigantoj de la agadoj de Jesuo). Ĝi estis konservata de kelkaj sekretscienculoj kiel Apollonius Tiana kiu estis altigata de la popolo ĝis la rango de la dioj kaj mortis pro la turmentegoj suferitaj en la malliberejoj de Romo. Paracelse kaj Agrippa ankaŭ okupiĝis pri magnetismo, ili trapasis vagadan vivon kaj mortis tiel mizere kiel Grafo de St. Germain aŭ Cagliostro.

Jen la martiroj de Magnetismo kiuj igis tiun scienccon daŭri tra la epokoj. Estas aliaj kiujn ni povas citi; inter ili Van Helmont, 1577, Belgo, kiu studis en Loveno.

Sed estis Mesmer, germana kuracisto, 1734, kiu unua donis al tiu « magia » povo la nomon « magnetismo animala », kaj kiu ĝin igis revivi, uzante ĝin kiel faris niaj praaŭvoj por la resanigoj. Li havis tiom da sukceso, kaj sekve naskigis tiom da ĵaluzoj ke li devis elpatrujiĝi, unue en Svisujon, poste en Francujon.

Vane li penadis interesi siajn kunfratojn pri sia eltrovaĵo terapeŭtika; ili al li respondis nur per malŝato. Tamen Mesmer prezentis raporton al la eminentuloj eŭropaj per kiu li klarigis sian teorion kaj la grandegan bonon kiun li el ĝi eltiris, ĝin aplikante al la kuracado de la malsanoj. Ĉio estis vana, oni eĉ ne respondis al li.

En Parizo oni nomis komisiistaron kiu bezonis du longajn jarojn por deklari ke magnetismo animala nur estas produkto de imago kaj de trompado!

Tiu krudega kondamno produktis baldaŭ neatenditajn efikojn; aliaj kuracistoj volis konvinkiĝi per si mem ĉu almenaŭ kelkaj veraĵoj ne estas kaŝitaj inter la diroj kiujn Mesmer tiel kuraĝe defendis. Tiam ni vidas homojn kiel Puységur, Deleuze, du Potet, Maxwel, Delafontaine kaj plie grandan aron da aŭtoritatuloj kunlabori al la gloro de tiu scienco. Ili lasis al ni multajn verkojn kiuj estas ankoraŭ multe legataj en la nuna tempo.

En la dua parto de la lasta jarcento, homo je granda persistemeco volis, laŭ kio ŝajnas, daŭrigi la laboron de Barono du Potet; estas pri S^o Durville, ke ni intencas paroli. Tiu energia homo sukcesis fondi en Parizo lernejon pri Magnetismo, tre prosperan, kiu fariĝis poste la « Magnetisma Societo de Francujo ». Ĝi estas formita el granda nombro da scienculoj kaj havas korespondantojn en tuta Eŭropo.

Charcot aplikante magnetismon al la histeriuloj en la Salpêtrière baptis ĝin per la nomo « hipnotismo », sed tiu scienco estas nur flanko de Magnetismo. Cetere li estis baldaŭ en malakordo kun la Skolo de Nancy koncerne la manieron de aplikado kaj ĝiaj efikoj; kaj kioma diferenco inter la bruteco de la hipnotistoj kaj la efiko kvietiganta de la dolĉaj elfluadoj kiu eldevenas el la magnetistoj kiuj nur klopodas por la bono de la malsanuloj! Kaj estas hodiaŭ nepre akirite ke la kuraciga potenco de la magnetisto estas potenco kiu pligrandiĝas proporcie al la sindonemeco kaj la bonaj sentoj kiujn li havas por sia samulo.

Estas pruvite hodiaŭ ke la « odaj » elfluoj havas sian resanigan devenon en la pureco de la sentoj de la aganto; estas cetere tio, kio igas lin plenumi mirindaĵojn. Kristo kaj la apostoloj estas de tio nerefuteblaj pruvoj.

La studo de magnetismo ĉe la virta homo potence kunhelpas lin en lia socia vivo, ĉar el lia tuta persono disfluas bonfaranta atmosfero kiu lin igas simpatia al ĉiuj kiuj lin alproksimiĝas.

Nuntempe la kono de Magnetismo, tre disvastiĝinta en la intelekta mondo kaj precipe ĉe la psikistoj, servas kiel perilo por eniri la misteran psikisman landon, tro malmulte

konatan. Estas tiamaniere ke S^o De Rochas unua sukcesis okazigi regreson de la memoro ĉe multe da subjektoj, kaj igi sin orienti la somnambulojn.

La «odo» aŭ fluida atmosfero de la homa korpo estas agilo de la mediumoj klarevidantaj kaj klareaŭdantaj, konsekvence ĝi naskigas sesan senton.

En Bruselo sekcio estas starigita ĉe la Societo pri Meta-psikismaj Studoj kie oni studas la somnambulisman, la telepation, la mentalajn elfluojn, kaj la fotografon de la nevideblo, t. e. la lumaj elfluoj nevideblaj.

Ni deziregas ke tiu scienco estu baldaŭ lokota ĉe la fundamenton de la medicinaj studoj, ĝi estas kampo riĉa je malkovroj kaj ĝi estas eble la ŝlosilo de la mistero, kiun Hipokrato, malgraŭ tuta sia genio, ne povis doni al ni.

PIERRARD,

Prezidanto de la Société d'Etudes
Métapsychiques, Bruxelles.

Tradukis A. S.



Telepatia Magnetkuracado

Jen ĵusa fakto, kiu estas tiom pli konsiderinda ke ĝi estas atestata de sinceraj scienculoj kiel la eminenta batalanto por vero S^o Emmanuel Vauchez, fondinto de la Ligo por la Instruado kun Jean Macé kaj C. Flammarion, aŭtoro de la grava verko LA TERRE (LA TERO), k.t.p. Ĝi certe interesos ĉiujn psikistojn; (frazon inter krampoj povos flankelasi la nespiritistoj). Ni aldonu ke tiu raporto ne povas esti reklamo, ĉar S^o Edward Troula ne estas profesiisto.

SinJORINO R., loĝanta en Les Sables d'Olonne (Vendeo), suferas de multaj jaroj pro graseca anemio tre forta. Kelkfoje, ŝia stato plimalboniĝas, laŭ tiu senco ke la gravaj nutr-organoj kaj nome la koro troviĝas ĝenataj en sia funkciado sekve de la troa amasiĝo de graso histo sur ilia ĉirkaŭo.

Antaŭ kvin jaroj, S^{mo} R., troviĝinte pli suferanta, estis kuracata dufoje, intersekve, de S^o Edward Troula, bonega magnetizanto, kiu profitis restadon ĉe Les Sables d'Olonne (Olonaj Sabloj) por ŝin magnetizi: sekve de tiuj du kuracadoj, S^{mo} R., malgrasiĝis je dudek funtoj (dek kilogramoj).

Antaŭ ne longe, ŝi troviĝis suferanta de nove, kaj ŝi petis de S^o Edward Troula kiu loĝas nun en Monako (princlando) ke li magnetizu ŝin traspaco. La kuracado komenciĝis la merkredon 16^{ma} de marto 1910 kaj daŭris ok tagojn.

S^{mo} R... pezis 187 funtojn je la komenco de la kuracado; kiam ĝi estis finita kaj cetero S^{mo} R... sin sentis en pli bona stato, ŝi pesis sin de nove: la pesilego montris pezon da 179 funtoj; ŝi do malgrasiĝis je ok funtoj, per la efiko de la magnetizado kiu praktikiĝis sur ŝin tra interspaco de pli ol 1.000 kilometroj.

(Ni aldonu ke la kuracado estis regata kaj prizorgata de amiko de S^{ro} Troula, Doktoro Mollé, kiu estas mortinta de jam kelkaj jaroj, sed kiu, en la transa kampo, daŭrigas helpi sian amikon kiel li faris dum sia tera vivo.)

Tiu belega kuracado, kiu mirigas S^{ion} R... kaj ŝian ĉirkaŭantaron, estas konvinkodona pruvo (kiu aldoniĝas al tiuj multenombraj kiujn ni jam posedas) de la bonfaranta rolo kiun povas havi magnetismo por la resanigo de multaj malsanoj.

EMMANUEL VAUCHEZ.

El la franca lingvo
tradukis J. C. C.

E. DUPIN, prof. de sciencoj.
(*La Nouvelle Presse* de la 3^a de
Aprilo 1910).



Libera Volo kaj Antaŭdestino.

La spertoj, kiujn la homo arigas en ĉiu momento de sia vivo, montras al li naturajn aperaĵojn kun duobla impresio: t. e. ili ŝajnas enhavi la liberecon kaj tamen ankaŭ la naturbezonecon.

La homo kiu en sia propra konscio, kaj precipe per la religiaj kredoj, sin rigardas kiel la plej superan estaĵon de la kreo, ne kapablas pensi ke li ne havas liberan volon. - Mi tamen povas fari kaj lasi tion kion mi volas! - estas la tiel ofta respondo ĉe la batalo por la libera volo de la homo. Nu, se al la homo oni malpermesas la liberan volon, kie do restas la respondeco? Tiam oni eĉ ne povus puni mortigon, k. t. p.; Li tamen ne *volis* tion...; li tamen ne *bezonis* tion! Kial do Dio donis spiriton al la homo, se ni ne povus laŭvole fari aŭ lasi tion kion ni volas?

Tiel parolas unuj kaj la aliaj opinias: - Ne, ĉion nur regas fatalismo -. Ekzistas leĝo de deveno kaj agado. Nenio okazas sen kialo, kaj neniu kialo estas sen sekvaĵo. La faktoj devas okazi iamaniere ĉar iliaj kaŭzoj ĵus tiamaniere ilin aranĝis; kaj ĉar la faktoj ĵus tiamaniere elsekvis, tial ankaŭ la kaŭzoj estis tiamaniere antaŭaranĝitaj. Ĉio kio ekaperas devas tial ŝajni kiel ferforta bezono kaj ĉio kio ne aperis ne *kapablis* aperi, estis *neebla*.

Same ankaŭ la homo devas agi tiamaniere kiel aranĝas la ĉiam antaŭantaj okazintaĵoj — konsiderataj kiel kaŭzoj — en la naturo (enhavantaj la homon kun lia pensado kaj sentado en la naturo).

La religioj starigas la liberan volon de la homo kiel dogmon; la scienco pravas la ĉiaman leĝon de fatalismo. Ambaŭ vidmanieroj montriĝas al ni kiel du paralelaj linioj rekte starigitaj sur la bazo de nia spertaro. Ni enmemorigu nun tiun ĉi geometrian figurigon kaj sekvu la daŭron de la linioj por scii ĉu ili do efektive paralelaj estas kaj ĉu ili neniam renkontas unu la alian (vidu pli malsupre la figuron).

La tranĉpunktoj de ambaŭ linioj kun la bazo estas — laŭ nia nura kono de la aperaĵoj — sur la spertolinio, tre for unu de la alia. La spertoj je libera volo eĉ ne ebligas sian kurligon kun tiuj de antaŭdestino.

Kiam de la nuraj spertoj ni supreniras laŭ la linio de libera volo, tiam tiu ĉi montras al ni la respondecon por niaj agoj kaj postulas, ĉe la dua, pli alta, loko, la liberan elekton de la agoj. Tion kontraŭstarante tamen la alia linio, tiu de antaŭdestino montras ĉe sama alto la nerespondecon, postulata de interĉenado de la faktoj.

Se mi libere elektas, mi bezonas la pensadon de la spirito, pesante tion, kio por fari aŭ por lasi estas plej bone por mi. El la spirito — estanta la tria punkto sur la linio de libera volo — devenas la libera elekto.


Se tamen per interĉenado de faktoj mi estas devigata agi tiamaniere kiel mi agas — kaj ne povas agi tiamaniere kiel

mi volas — mia konduto devas esti antaŭvidebla, mia spirito devas scii tion kio okazos kaj tio estas farita per la racio de la homoj, kiun ni portas kiel trian punkton sur la antaŭdestinolinion. (*)

Sed tiu konstruaĵo de kaŭzoj kaj agoj devas montriĝi prilaborata kun granda zorgemeco kaj akurateco ĉe siaj plej detalaj kaj malgrandaj aperaĵoj, kio igas antaŭsupozi neŝangeblan « plej puran matematikon » kiu trovas sian aŭtoron en tiu devena forto « Dio ». — La pesema spirito male postulas fortestarantan « plej puran leĝon » laŭ kiu ĝi kapablas fari siajn konkludojn. La kreinto de tiu ĉi leĝo estas ankaŭ Dio, la kreinto de ĉiuj aĵoj.

Tiel do intertrancigiĝas ambaŭ linioj en tiu nedifinebla punkto, « Dio », per kiu laŭ ĝusta kaj saĝa kono la vojo de la homo certe estas destinata, ne forprenanta de li la liberan elekton.

Se ni konsideras ankoraŭ tiun ĉi triangulon, kiun, kontraŭstarantan al la teozofia kaj teologia, oni povus nomi *filozofia* triangulo, ni trovas en ĝi klarigon de la « *Trieco* » elmontrata per la teologia triangulo.



(*) Laŭ la materialista vidpunkto ekzistas neniu diferenco inter la spirito kaj la racio. Ni tamen nin apogas sur la spiritalista interdivido de Plato, Schelling, Hegel, Wirth, kaj aliaj kiuj konsideras la racion kiel la diecan parton de la homaj konoj. J. H. Fichte, Ulrici, Frohschamer trovis ankaŭ diferencan, kiu taŭgas por nia triangulo, ĉar ili lasis la spiriton okupiĝi nur pri la senta mondo kaj la racion pri la transsenta, kaj ankaŭ la interdivido de Kant: ke la racio estas la konoj laŭ principoj « a priori »; la spirito, tiuj laŭ principoj « a posteriori », estas ankaŭ trafanta tie ĉi.

Dio-Patro la ekkreinto de ĉio estanta, eksciigas per sia filo, laŭ sia parolo, sian plej sanktan leĝon, per kiu ni, homoj, pesante per nia spirito, eksentas la respondecon kaj antaŭeniras al la malvolviĝo de la animo; ŝajne lasante al ni plenan liberan volon. Sed Dio ankaŭ sendas sian sanktan spiriton kiu, per la racio, gvidas la homojn por prava agado, laŭ plej saĝa Dia ordono, tiamaniere ke niaj agoj al ni ŝajnas interĉenataj, same nin gvidas fatalismo.

Libera volo kaj antaŭdestino, ŝajne kontraŭdiraĵoj por ni, homoj, kun nia limigita spirito kaj nia malbone heligita racio; kiuj, kun niaj konoj nur kapablas leviĝi tre malalte trans la linio de la spertoj.


Sed trans tiu spertadsojlo, sur la alia pli alta ekzistŝtupo ĉio por ni iĝos pli klara, kiel al ni malkovris akurataj sciigoj de somnambuloj kaj ankaŭ de mediumoj. Ankaŭ la transanoj nur gvidas laŭ ĝustaj leĝoj nian destinon, kun granda klareco, tamen ankaŭ por si sed ne plu por ni. « Vi ne estas plu respondecaj, konsiderate laŭ nia vidpunkto, sed tamen ŝajne ni » ili opinias « kvankam ankaŭ ni estas gvidataj de pli altumaj estaĵoj kiuj denove ne estas sendependaj. Sed la homo kiu pro sia tera sorto estas malkontenta devus pripensi ke por la kristano kiel por la spiritisto, valoras plej alta principo, — alie tiu mondo ne estus gvidata per Dio (Gott, kiu devenas de « Gut » — Bono) —. « En la Dia regno ĉio estas harmonio ».

Kaj same kiel en la muziko la dissonaĵoj dissolviĝas en agrablan akordon, tiel ankaŭ la dissonaĵoj de la tera vivado, tiu suferado, sangiĝos en duoblan ĝojon eĉ se tio nur estos je la alia flanko de la Mortpordego.

La antaŭscienco de Dio ligas sin tie ĉi, harmonie kun antaŭdestino kies akran formon oni vane volis trudi kiel dogmon. Plie al la neutilaj, sensencaj zorgoj de multaj homaj estaĵoj, tiu konsiderado ordonos halton. « Vi zorgu, sed vi ne zorgu tro multe; ĉio ja okazas tiel, kiel Dio tion volas ».

Tradukis A. S.

Rud. FEILGENHAUER,
Oberleiter des Innern des
Zentralverbandes Deutscher Spiritisten.
Köln.



Kelkaj personaj okazintaĵoj

Por tiu kiu eĉ ne posedas mediuman kapablon estas sufiĉe malfacile kompreni kaj prijuĝi mediumajn fenomenojn. Almenaŭ mi tion spertis. De la unua tempo, kiam mi komencis okupi min je ĉi tiuj aferoj, ĉiam estis insistata de spirita flanko, ke mi estas sen iu ajn mediuma naturkapablo, kaj ke mi pro tio ĝoju, ĉar mi ĝuste per tio laŭ persona, sobra meditado estas kapabla juĝi tion, kio okazos.

Sed tamen mi havis tiun ĝojon, kaj mi devas aldoni: tiun grandan favoron kaj profiton, travivi tute apartan serion da mediumaj fenomenoj, supozeble por ke mi ricevu pli klaran komprenon pri la limoj inter la materiaj kaj la spirita sentimpresoj, inter propra konscia enhavo kaj spirita informoj. El ĉi tiuj travivaĵoj mi ĉi tie rakontos kelkajn.

La unua okazintaĵo de l' preparolita speco estis okazo de *Clairaudience* (klar-aŭdado). Mi staris en la strato atendante tramveturilon, kiam mi aŭdas voĉon kiu diras: « Reiru! ». Samtempe mi estis informata, ke estas neutile forveturi, kaj pri kio mi anstataŭe devos fari, kaj kiu li estis kiu parolas. Ke estas neutile forveturi, povus deveni de mi mem, sed tion kion mi devos fari, mi absolute konsideris kiel nebla. Sed ĉiam pli forte mi aŭdis la vorton: « Reiru! ». Kaj nun mi atentis ke la vortoj klare atingis mian konscion tra mia maldekstra orelo (mia dekstra orelo estis

tute surda), tial ke mi estis tentata min turni por vidi la parolanton; sekve mi tion aŭdis fizike, dum la vortoj konstante estis sekvataj de longa ideassocio kiu vere trarapidigis mian cerbon, sed tamen ne devenis de mi mem, ĉar mi plej fervore diskutadis kun ili per miaj propraj pensoj. Daŭris longe antaŭ ol la tramveturilo alvenis, tiel ke mi havis bonegan okazon observi la fenomenon kiu cetere estis por mi malagrablega, ĉar guste al mi urĝis. Mi tamen forveturis, sed baldaŭ revenis sen rezultato. Tamen mi ne intencis fari tion kio estis dirita, ĉar mi tion konsideris kiel nebla kaj ne sendanĝera. Sed tiam mi ree aŭdis la voĉon: « Komencu! ». Nun mia cerbo estis malplena je pensoj, Mia konscio nur enhavis tiun solon: « Estas neeble; mi ne kuraĝas ». Sed pli kaj pli forte la voĉo sonis: « Komencu! ». Daŭris duonan horon. Tiam mi obeis. Kaj certe neniam io sukcesis al mi tiel bone kiel ĉi tio kaj eĉ malgraŭ ĉia homa kalkulado. Kaj samtempe tio estis *por mi* la pruvo de persona okazintaĵo kaj de materia kaj de spirita « Clairaudience ».

Ankaŭ kelkajn ekzemplojn de « *Clairvoyance* » (klar-vidado) mi travivis. Dufoje mi tute klare vidis la homan « Aura'n ». Je la unua fojo mi ĝin vidis ĉirkaŭ du diferencaj personoj kiuj unu post la alia staris sur la sama loko; klare kaj en hela taglumo mi observis la diversajn individuajn karakterojn de l' « Aura », ĉe unu larĝa, eksteren proporcie malpliiganta, de l' ŝultroj supren formante super la kapo supre rondigitan konuson, ĉe la alia iomete pli mallarĝa, sed fortege brilanta plej proksime ĉe la korpo kaj tute sekvante la konturojn de l' korpo, ĉirkaŭ la kapo, kontraŭ la kolo kaj ĉirkaŭ la ŝultroj. Aliajn fojojn mi antaŭtagmeze vidis en mia klaso en la lernejo tute neatendite la « Aura'n » ĉirkaŭ tri el miaj lernantoj kiuj sidis en diversaj lokoj de la ĉambro. Ĉe ambaŭ okazintaĵoj mi observis la fenomenon dum kelkaj minutoj kaj mi aliloken rigardis fojon post fojon, sed tamen ĝi ne malaperis.

Dum longa tempo mi laŭ admono de l' spirita flanko estis sidanta regule por *automata skribado*, sed nur kelkfoje

mi atingis rezultatojn certigantajn al mi. Kontraŭe okazis al mi tiel karakterizaj ekzemploj de *inspirita skribado kaj parolado*, ke mi tute ne kuraĝas tion atribui al mia propra konscia enhavo.


Fine mi rakontos *okazintaĵon* kiu por mi estis la plej konvinkanta pri la influado de l' spiritaj inteligentuloj al la materia mondo.

La 27^{an} de majo 1908 mi vekigis kaj vidis, ke horo estas 5³⁰; ne pensante ion ajn mi ree ekdormis, kaj tiam mi vidis leteron kiu estis tenata antaŭ mi per du manoj, leteron kiun mi ĉiame relegis, dum mi tute malrapide vekigis, ĝis mi, je la sesa horo, estis tiel maldorma, ke mi leviĝis, kaj ĉe mia skribtablo mi komencis skribi, mi ankoraŭ estis kapabla vidi la leteron antaŭ mi, tamen la unuaj vortoj de la titolo estis necertaj. Iom post iom, dum la skribado progresis, la letero malaperis kaj fine nur restis la subskribo, belega kaj karakteriza A. Kaj ĉi tiu A staris tiel klare, ke ankoraŭ mi estas kapabla ĝin vidi, nun tamen ne per mia materia vido. Sed tiam ŝajnis al mi, ke materie mi vidis la leteron, kvankam aliaj objektoj antaŭ mi estis videblaj tra ĝi. La okazintaĵon mi sekretigis, kaj zorgeme mi kaŝis la raporton en la plej interna fako de mia paperujo. La raporto mem estis de grandega valoro por la kunsida laboro de nia rondo. Nur la subskribon mi ne konis. Post dekkvar tagoj la informo estis certigata, kaj mi tiam diris, ke dum dekkvar tagoj mi ĝin bone sciis, kaj mallonge mi rakontis pri la letero kiun mi estis vidinta. Tiam ĉeestanta virina mediumo subite estis ekkaptata per forta kontrolo en la brako, kaj nun per skribado virina spirito, *Alvilda*, la gvidulino de l' mediumo, sciigis, ke dum tiu nokto mi estis liberigita, kaj sur la Astralsfero mi estis estinta kune kun ili, kaj dum tiu kunveno mi diskutadis diversajn cirkonstancojn rilate al la laboro. Sed fine mi estis deklarinta, ke ĉio estas neutila, ĉar mi ja ne estos kapabla memori ion, kiam mi la venontan tagon ree estos en la tersfero. Tiam ili estis promesintaj al mi, ke ili ĉi tiun fojon volis prizorgi,

ke mi la plej gravan memoru. Ĉi tion ŝi do faris per tiu speciala maniero. Kaj por atesti la verecon ŝi laŭ fortega materia kontrolo skribis A'n, precize kiel mi ĝin vidis en la letero, kaj kiel la mediumo neniam skribis ĝin aŭ estus kapabla ekpensi ĝin skribi. Nun mi montris miam skribitan raporton kaj prezentis ĝin al la ĉeestantoj kiuj ĉiuj kun plej granda miro observis, ke la A sur ambaŭ lokoj estis precize la sama.

CHR. LYNGS,
Instruisto ĉe popola lernejo,
Prezidanto de la
Dansk Metapsykisk Selskab
KOPENHAGO.

Tradukis
F^{ino} Astrid Rasmussen
Vicinspektoro.



Universalista Unio por Filozofia Serĉado

Esperanto kaj la Tutmonda Progreso

Al la Esperantistoj.
Al la Idealserĉantoj.
Al la Pioniroj por la Vero.

La penado farita de la Esperantistoj en la tuta mondo estas inda je ĉiuj laŭdoj.

Esperanto estas unu el la multaj, sed unu el la plej fruktonaj konkretigoj de la ĝenerala progreso, kiu altiras la homaron al ĉiam pli grandaj destinoj. Nuntempe la homaro ne jam konscias tiun suprenireman marŝon kiu igas ĝin daŭrigi, malrapide sed nelacigeble, la vojon kiun ĝi devas sekvi. Ĝi eĉ ne havas de si mem konsecon kaj estas el tiu fakto ke devenas la baroj kaj la kritikoj kiujn la Esperantistoj renkontas. Ilia klopodado estas vivigata de la spiro de estonteco, kiu nur estas komprenata, aŭ nur estas antaŭsentata de la estaĵoj, sufiĉe altespiritaj por koncepti, sub la diversaj formoj, ĝian profundan intereson kaj ĝian devenon iomete okultan.

Komprenoble la Universalistoj estas tre bonvolemaj je la fratiĝa laboro por kiu klopodas la Esperantistoj.

La Universalista Unio por filozofia serĉado enskribis sur sian programon la serĉon de ĉio, kio povas helpi la progreson, pliproksimigi kaj unuigi la homojn. Esperanto estas potenca disvastigilo, kiu estas destinata por efektiviĝi la fratan kuniĝon.

Ni proponas ankaŭ volonte al la Esperantistoj, komenci daŭrajn rilatojn. Estus certe tre utile ke niaj penadoj, niaj ambicioj kaj niaj efektiviĝoj estu konigataj al ili, ĉar la *Universalista Unio por Filozofia Serĉado* estas fondita « por » la intelekta akordo ĝenerala, en la unueco de la integrala

« vero, per la federacia unio de doktrinoj kaj skoloj por la »
« pacigo kaj la ĝenerala progreso per la scienco kaj la »
« amo ».

La iniciatintoj de Esperanta Psikistaro al ni propramove kaj frate siajn manojn etendas. Tre volonte ni premas ilin kun amemo, kaj konsiderante tiujn pionirojn kiel la enkorpiĝon de ĉiuj fratoj kiuj estas kun ili.

Nia penado estas idemovado per la asocio de bonaj volo kaj la grupado de bonaj fortoj. Pli ol 60 societoj aliĝis al tiu ĉeno morala, kiu havas la favoron unuigi, per sia formo de Ĝenerala Federacio de la Penso, la personojn kaj la grupojn per iliaj plej bonaj intencoj, lasante al ili tutan ilian liberecon kaj kompletan ilian sendependecon.

Nia labordevizo « Sursum corda ! = Alten la korojn ! » estas apogata sur organizaj principoj, frata senpartieco, nepersoneco, sincereco, sendependecon.

Universalismo estas metodo kiu povas alcentrigi la ĉefajn penadojn de la tradicio, ligi ilin, kaj alfari ilin ĉiam al la progreso de la evolucio.

Estas do por iu « Universala » Credo « de la homa penso » ke ni laboras ĉiuj en la integrala sintezo de la homaj konoj; por la akordiĝo de la partiaj opinioj discelantaj, en la unueco de la vero.

La apogilo de tiu laboro por la vero kaj la amo estas formulita en « L'Essor moderne vers l'Idéal des Temps nouveaux » kiu fondas la doktrinon interakordigantan « Universalismo », Integrala Monismo aŭ Panmonismo, kiu malvolvas kaj prezentas la novajn perspektivojn de la nuntempa penso, la universalajn leĝojn de la naturo kaj de la vivo, la destinon de la estaĵo kaj de la homaro.

Je nia epoko de intelekta kaj morala superŝutado, la bezono de nova idealo, samtempe pli vasta kaj pli preciza ol la antaŭaj, igas sin senti pli kaj pli forte.

Ke ĉiuj laborantoj de la penso leviĝu por partopreni en la laboro por la estonteco, en la efektiviĝo de la konscia feliĉeco, tiom meritata, al kiu ni ĉiuj estas vokataj sed kiun ni devas aperigi ni mem per niaj raciaj penadoj.

La Universalista Societo enhavas :

1° La Federacio Spiritualista Universalista por la pliproksimiĝo kaj la agado komuna de ĉiuj spiritualistoj.

2° La Homarista Konfederacio Internacia por la konverĝigo de ĉiuj ambicioj homaraj, kampo de akordo inter la materialistoj (1) kaj spiritualistoj, akordo pretigata kaj faciligata per la universalistaj intencoj, kaj kiu ebligos la akordon en la unueco de la Vero, okaze de ebla interakordo de la skoloj materialistaj, pozitivistaj, monistaj kaj evoluciistaj.

Se la Esperantistoj tion deziras, ni konigos volonte al ili, per mallongaj, resumitaj artikoloj, la elementojn de la laboro (2) kaj klopodado universalistaj kiuj jam malkovris mirindajn horizontojn por la scienco kaj por la penso. Esperanto tiamaniere havos, cetere, apogdoktrinon, santepe sciencan, filozofian, belaman, vere universalan (3) kaj indan je ĉiuj fidoj (4).

Al ĉiuj tre frate kaj kun espero,

Tradukis A. S.

La Ĝenerala Sekretario,

HEIDET DE HEYDECK.

(Paul Nord.)

(1) Estas efektive malprave ke ambaŭ grandaj skoloj, inter kiuj partiĝas la homa spirito, materialismo kaj spiritualismo, sin konsideras kiel kontraŭbatalantojn, kaj kredas ke iliaj anoj vivas, laŭ speciala vidpunkto, en du diferencaj mondoj. Nur ekzistas *unu vereco*, kaj ni starigas science ĝiajn pruvojn kaj apogilojn en la Panmonismo. — H. de H.

(2) Mi povus komenci per resumaĵo destinata por la propagando kiun ni publikigos baldaŭ « *La crise moderne et la conscience contemporaine* » kiu plenumas la nunan bezonon de la penso kaj socia malkvieteco. — H. de H.

(3) La Regularo estas adresota al ĉiu persono kiu ĝin petas de la Sekretariejo de la U. U. F. S. 86, Boulevard de Port Royal, Parizo, Francujo. — H. de H.

(4) Certe Esperanto enhavas homaran *internan ideon*; sed estante, kiel lingvo, bieno de ĉiuj, ĝi devas esti sendependa de ĉiu doktrino. (Noto de *Esperanta Psikistaro*).



Klariga Rimarko

Pri la rilatoj inter Esperanto kaj Psikismo (ĉu simple faktoj, ĉu doktrinoj apogiĝantaj sur ili), jen kia estas nia vidpunkto:

Certe ni opinias ke granda kuniĝemo interligos pli kaj pli, en la estonto, la du aferojn; ĉar, kiel tre prave diras nia honora prezidanto Rektoro E. Boirac, « Esperantismo kaj Psikismo respondas al la samaj bezonoj de la homa spirito », kaj, parolante nur pri temo komuna al ĉiuj psikistoj, ni povas konsideri, kiel li ankaŭ diras, ke Esperanto « vere estas kvazaŭ nova telepatia sentorgano, t. e. sentorgano de la internacia vivo. »

Sed, por ke Esperanto povu efektiviĝi la gravajn utilojn kiujn ni esperas de ĝi, necese estas ke ĝi vivadu; kaj, por tio, necese estas ke ĝi estu sendependa de iu ajn doktrino. Se ne, tuj naskiĝus malpaco inter esperantistoj, pro batalo inter doktrinoj diversaj. Esperanto devas esti per si mem; ĝi havas sian propran gravecon, sian propran efikon. Ĝi ne estas nur lingvo; ĝi estas lingvo *internacia*. Ĝi enhavas do kapablon internaciigan, forton kvazaŭ homarigan, kiun nia genia majstro Doktoro Zamenhof nomas *interna ideo*. Tio ne estas doktrino, sed fakto.

Do Esperanto vivadu kaj kresku per sia propra esenco; kaj tute nature ĝin alprenos kaj utiligos la samcelantaj aferoj. Sed tia natura alfarado ne pli bezonas doktrinan formulon ol pulmo bezonas teorion por enspiri alfareblan aeron.

Sufiĉas ke la doktrinoj aliĝu al Esperanto, ĝin uzante; tio estas egala rajto por ĉiuj. Sed inter ili, kompreneble, la homaraj ricevos de ĝi plej grandan profiton.

LA INICIATINTOJ DE
ESPERANTA PSIKISTARO.

Informo por la spiritistaj aligintoj de « Esperanta Psikistaro »

Internacia Oficejo de Spiritismo

fondita 1/12/1910.

(Ĉiuj komunikaĵoj devas esti sendataj al la sidejo :
39, Rue de la Petite Ourse, Anvers, Belgique)

La Universala Spiritista kongreso, kiu okazis en Bruselo de la 14^a ĝis la 18^a de Majo, 1910, aprobis je ĉiuj voĉoj en sia ferma kunsido, la sekvantan deziron :

“ Krei konstantan internacian oficejon kun la celo ekstarigi „ daŭrajn rilatojn inter la grupoj de diversaj nacioj. ”

La Federacio Spiritista Belga estis komisiata je la efektivigo de tiu deziro ; konsekvence, tiu Federacio submetis al la Povo spiritistaj reprezentitaj en la Kongreso projekton de statutoj kiu estis akceptata, kaj kies ni donas la tri unuajn artikolojn ĉi sube :

Statutoj de la Konstanta Internacia Oficejo de Spiritismo

Art. 1^a. — Estas fondata, konforme al la deziro esprimita de la Universala Kongreso Spiritista de Bruselo, 1910, *Konstanta Internacia Oficejo de Spiritismo*.

Art. 2^a. — Tiu oficejo havas la celon ekstarigi daŭrajn interrilatojn inter la spiritistaj grupoj de diversaj nacioj kaj kolekti informaĵojn pri la spiritista movado en la tuta mondo ; ĝi organizas periode Universalajn Kongresojn Spiritistajn.

Art. 3^a. — La oficejo konsistas el unu ano por ĉiu aliĝanta nacio

N.-B. — La Oficejo eldonas trimonatan Bultenon.

